

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Esperanto kontraŭ la  
ideo de Eŭropo

UK-94: Granda  
subteno en Bjalistoko

ARKONES: Simple la  
plej bona

Esperanto-novaĵoj el  
multaj landoj

Nerezignebla renovigo

Corsetti respondas

La Sukcena Lando (9)

“Diagnozo de morto”  
de Ambrose Bierce

Nobelpremio 2007  
por Doris Lessing

Ido – 100-jara



Novembro  
2007

**№11**

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №11 (157)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, ALEN KRIS, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefona** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2008**

*Internacia tarifo:* 32 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 18 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 390 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldon:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la paĝo 23.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 700 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №11 (157).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 октября 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Vortoj de Komitatano Z.

### Bonvenon al Probal, absolvon al Edvige!

Denove ni havas novan UEA-estaron kaj denove la samajn esperojn kiel antaŭ tri jaroj. Estas ankoraŭ tro frue recenzi la estraron, kvankam prezidanto Probal Dasgupta jam ricevis iom acidan bonvenigon de iuj komentistoj, ankaŭ en tiu ĉi revuo. Ĝuste la prezidanton oni atente observas. Ĉiu ajn estus tre alia ol Corsetti, al kies stilo ni jam al kutimiĝis, eĉ se multaj ĝin ne digestis, sed hinda prezidanto estas neeviteble tre malsama ankaŭ kulture. La bildo, kiun membroj ricevas pri la prezidanto, laŭ nevideblaj vojoj influas la sorton de la asocio. Plimulto de la UEA-anoj estas okcidentanoj. La prezidanto bone impresu ilin, ĉar ili pagas la ludon.

Pri la elektokomisiono la verdikto definitivas: katastrofa. Ĝi estis superregata de Edvige Ackermann, el kies mankantaj kvalitoj diplomatieco estis nur unu. Ĉar la komisiono volis elpaŝi eksteren unuece, ĝi egalas al sia plej fuŝa membro. Estas enigmo, kiel la antaŭa komitato povis reelekti la italan damon por tasko, pri kiu jam en la unua fojo ŝi fiaskis kaj estis forte kritikita. La nova estraro eble rezultus sama ankaŭ sen ŝi en la komisiono, sed la procezo estus pasinta pli elegante kaj, ekzemple, sen aĉa konflikto kun la kroata landa asocio, kiu koleriĝis eĉ pli ol necese pro ŝia insisto estraranigi Marija Beloŝević, kun kiu ĝi malpacas. Unika estis la reago de nia Edvige, kiu pravigis la kandidaĵon per tio, ke kiel LKK-ano de UK en Florenco ŝi mem kverelis kun la aliaj kaj demisiis. Pro ŝia obstino la amikino suferis publikan humiligon per draŝa malsukceso en la voĉdonado. Tamen malgraŭ ĉio decas absolvi Edvige kaj transŝargi per ŝiaj pekoj tiujn, kiuj dufoje komisiis ŝin pri tasko, kiu superis ŝin.

Kvankam komitatoj kritikis la stumblojn en la elekto-procezo, pri la rezulto ili ŝajne estis kontentaj. Escepto estis Amri Wandel, kiu eĉ post la UK plu plendis pri sia ne-reelekto. Laŭ li tio okazis pro la proceduro, sed manko de apogo al lia plendo sugestas ion alian. Por ekstera observanto lia estraraneco pasis nerimarkite, kaj tiel verŝajne spertis ankaŭ komitatoj. Fakaj asocioj sinkis pli profunden en sia krizo, sed oni ne rimarkis, ke Wandel kiel respondeca estrarano aktive intervenus en tio. Verŝajne li estus senkonsila ĉiukaze, ĉar velkis ankaŭ lia propra astronomia asocio. Ni vidos, ĉu José Vergara kiel lia anstataŭanto iniciatos ion por eliri el la krizo, aŭ ĉu fakaj asocioj estas io, kies tempo senespere pasis.

Interese estos vidi la evoluon de rilatoj inter la estraro kaj la Centra Oficejo, precipe la ĝenerala direktoro. En sia parolado en Jokohamo Dasgupta promesis “aŭskulti la CO-kolegojn”. Kiel iama volontulo li ankaŭ konas la medion de la CO, kio helpas fari la rilatadon pli glata. Sia-vice Osmo Buller ekparolis publike pri sia deziro ree dungi oficejan direktoron kaj pligrandigi la stabon. Se la anonco de la estraro en 2004 pri la reveno de Buller por kvin jaroj estis fiksita en kontrakto, la nuna estraro devos decidi pri ĝia daŭrigo. Ĉu la deziroj de Buller estos kondiĉoj, jen la demando.

*Komitatano Z*

**La kovrilpaĝa foto** de Olga Ŝipovalenko atestas, ke en nia eldonurbo komenciĝis aŭtuno. Tamen en la suda hemisfero nun estas printempo. Sed por ĉiuj ĝi estas abonsezo.

# Esperanto kontraŭdiras la ideon de Eŭropo

## Dafydd ab Iago skribas el Bruselo

Multaj esperantistoj skribis al eŭropaj politikistoj, proponante Esperanton kiel laborlingvon en la Eŭropa Unio, organizo kun 23 oficialaj lingvoj kaj regiono kun ĉ. 60 regionaj kaj malplimultaj lingvoj. Tamen ĉiam pli malpli samaj respondoj revenas al la poŝtkestoj.

En la komitato pri kulturo kaj edukado de la Eŭropa Parlamento Milan Gaľa (Eŭropa Popolpartio) en oktobro demandis la novan respondecon pri multlingvismo, Leonard Orban: “Mi rimarkas ke estas iniciatoj por enkonduki Esperanton kiel universalan lingvon. Esperanto povas esti uzata kiel universala lingvo en kunvenoj. Kio estas via opinio?”

“Mi estas honesta, — respondis Orban, post kiam oficisto donis al li paperon kun skizo de respondo. — Rilate al Esperanto ni ne volas starigi demandojn pri la nuna lingva reĝimo. Egaleco inter la lingvoj en EU respegulas la egalecon inter la EU-civitanoj... Ne ekzistas vojo, eĉ se homoj volus, kaj ni ne volas, ke iu povu ŝanĝi la nunan lingvan reĝimon en EU. Ni devas alfronti la kreskantan bezonon por tradukado en la Eŭropa Parlamento. La maniero, laŭ kiu ni respondas, devas agnoski la limojn de financaj rimedoj. Ni devas eviti kompletan kreskadon de elspezoj”.

En gazetara konferenco Orban estis eĉ pli honesta. La tradukado kaj interpretado kostas jam 1.1 miliardojn da eŭroj jare. Ĉu universallingvo kiel Esperanto povas esti solvo? “Ne, tio tute ne estas bona solvo. Universala lingvo kontraŭdiras la ideon de EU. Estas avantaĝo, ne nur el kultura sed ankaŭ el socia vidpunkto, multajn lingvojn paroli”, — respondis Orban, kiu estas la unua komisionano respondeca nur pri multlingvismo. Antaŭ 2007 multlingvismo estis aldona respondeco de la nuna Komisionano pri Kulturo kaj Edukado Jan Figel. Pro manko de aliaj taskoj, kaj pro netaŭgeco de la homo proponita de Rumanio, la prezidanto de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso estis devigita doni “nur” multlingvismon al Orban. “Estas grandega avantaĝo por la Unio kaj ĝiaj entreprenoj, ke certaj lingvoj de la EU estas internaciaj lingvoj, — daŭrigis Orban. — La angla, franca, hispana kaj portugala estas gravaj EU-lingvoj kaj, samtempe, mondgravaj. Tiun avantaĝon ni ne volas fordoni”.

Orban sekvas longan tradicion de kontraŭesperantismo. En januaro 2004, EU-komisionanino Viviane Reding en la plenkunsido de la Eŭropa Parlamento klarigis, ke “multlingveco inkludas tiujn niajn lingvojn kiuj ne estas oficialaj, sed certe ne Esperanton, ĉar ni havas sufiĉe da vivantaj lingvoj en malfacilaĵo, por krei, krome, lingvojn artefaritajn”.

En letero al Zlatko Tišljariĉ de la Eŭropa Esperanto Unio (EEU), Jacques Delmoly, ĉefo de la unuo “Politiko de Multlingvismo” en la Eŭropa Komisiono, klarigis la opinion de la Komisiono pri artefaritaj lingvoj, nomitaj ankaŭ *kunmetitaj* aŭ *inventitaj* lingvoj: “Nia politiko stimuli lernadon de lingvoj kaj lingva diverseco en la multlingva Eŭropa Unio fontas el la deziro ne nur faciligi komunikadon inter unuopuloj, sed ankaŭ stimuli ŝtatanojn por kompreni kulturojn de najbaroj, tiel ke ili eniru la pensmanieron, kiun esprimas lingvo de najbaro. Kunmetita lingvo tion ne ebligas”.

Delmoly daŭrigis, ke la eŭropa politiko pri lingvoj ankaŭ baziĝas je la postulo, ke civitanoj devas povi kompreni leĝdonadon, kiu ilin koncernas. “La plej bona maniero certigi



EU-Komisionano Leonardo Orban, respondeca pri multlingvismo, ne subtenas Esperanton (Foto de la Aŭdvidservo de EK)

tion estas publikigi la leĝojn en lingvoj, kiuj estas uzataj en naciaj kadroj. Kunmetita lingvo ne povas kontentigi tiun celon. Se pri ĉiuj aktivadoj de EU ni perforte enkondukus ununuran lingvon, kunmetitan aŭ naturan, tio ekskludus multajn civitanojn el la partopreno en demokratiaj procedoj kaj konsekvence la Unio estus malpli efika, malpli klara kaj malpli leĝobea”, — argumentis Delmoly.

La disputo inter EEU kaj la EU fontas en nura piednoto de la *Komunikaĵo pri Multlingvismo*. En tiu dokumento, ellaborita en novembro 2005 sub la gvidado de Jan Figel, la Eŭropa Komisiono argumentis ke “... kompreno pri aliaj kulturoj venas per lernado de la lingvoj kiuj ilin esprimas; pro tio la Komisiono ne instigas al uzado de artefaritaj lingvoj, kiuj laŭdifine ne havas kulturajn referencojn”. Tiu pensmaniero ankaŭ estis respegulita en la retejo de la Eŭropa Komisiono. Tie estis rubriko *Oftaj demandoj*, kiu notas en mallonga sekcio pri “lingvo artefarita” ke “... laŭdifine, tia lingvo estas nenies denaska lingvo, kaj vortoj sen ligo al historio aŭ al viva kulturo ne estas sufiĉe precizaj por juraj celoj”. Post plendoj de esperantistoj, la paĝo estis forigita.

La forta kontraŭo al Esperanto aperas ankaŭ en la Eŭropa Parlamento, alia celo de niaj letterskribantoj. Bela ekzemplo estis amendo 16 al raporto de EP-ano Gianfranco Dell’Alba pri la Parlamenta Regularo de Proceduroj. Tiam, en marto 2004, EP-anoj Michael Gahler kaj Ingo Friedrich argumentis, ke la «ideo de enkonduko de “neŭtrala ponto-lingvo” kiel Esperanto estas rekte kontraŭa al la postulo en la unua parto de la citaĵo: konservi la “diversecon kaj riĉecon de Eŭropo en kultura kaj lingva kampo”. «Estas nedisputebla, ke lingvo subtenas kulturon, kaj la du estas nedisigeble ligitaj, kaj tion ne povas fari artefarita lingvo, kiel la projekto “Esperanto” jam montris...»

Ankaŭ dum vizito en junio en Hispanio, Orban klare rifuzis la eblecon de komuna lingvo, kiu povus faciligi komunikadon inter EU-civitanoj. “Mi estas kontraŭ, ĉar dum ni progresas al integriĝo, ni devas pluteni diversecon. Estas nia riĉeco kaj ni ne devas nin kompari kun Usono”, — klarigis Orban.

“Mi kredas, ke se EEU ne intencas peti akcepton ĉe Orban por defendi la motivojn de Esperanto, eble EDE [Eŭropo Demokratio Esperanto. — d.a.i.] povus fari tion. EDE estas politika partio, kiu ĝuste okupiĝas pri tio,” — konsilis la tiama prezidanto de UEA Renato Corsetti.

## Laborvizito en Bjalistoko

11–12 okt la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães faris laborviziton al Bjalistoko.

Temis pri ilia unua vizito al Bjalistoko post la decido de la Estraro de UEA, ke la 94a Universala Kongreso de Esperanto en 2009 okazos tie por prifesti la 150an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. La oficistojn akompanis la Ĝenerala Sekretario de UEA Barbara Pietrzak kaj, flanke de la loka esperantistaro, Jarosław Parzyszek kaj Elżbieta Karczewska, prezidantoj respektive de Fondumo Zamenhof kaj Bjalistoka Esperanto-Societo, kaj Nina Pietuchowska, sekretario de Fondumo Zamenhof.

Denove konfirmiĝis la eksterordinare favora sinteno, kiun Esperanto kaj UK ĝuas ĉe la aŭtoritatoj de la naskiĝurbo de Zamenhof kaj kiu manifestiĝis en la Jokohama UK per la elpaŝoj de la urbestro, d-ro Tadeusz Truskolaski.

Dum renkontiĝo kun la urbestro la reprezentantoj de UEA traktis diversajn aspektojn de la antaŭvidata urba subteno al la organizado de la UK en Bjalistoko.

Poste d-ro Truskolaski kaj Osmo Buller donis gazetaran konferencon, en kies komenco Buller transdonis al la urbestro specialan diplomon pri lia elekto kiel “Amiko de Esperanto” rezulte de voĉdonado de la reta gazeto *Freŝo*. La konferencon partoprenis ĵurnalistoj de multaj lokaj kaj tutlandaj amaskomunikiloj.

La funkciuloj de UEA diskutis pri UK-preparoj ankaŭ kun vicurbestro Aleksander Sosna kaj konatiĝis kun turismaj entreprenoj. Ili vizitis la ejojn de la Teknika Universitato, kiu funkcias kiel la ĉefa kongresejo de la 94a UK kaj apud kiu estos starigita granda tendo por la inaŭguro k.a. programeroj celitaj por la tuta kongresanaro.

En la densa programo estis ankaŭ multnombre vizititaj prelegoj al studentoj. Osmo Buller parolis en la historia fakultato de la Bjalistoka Universitato pri la historio de UEA kaj UK-oj. Grandan intereson elvokis la prelego de Clay Magalhães al studentoj de turismiko en la Teknika Universitato pri la organizado de UK-oj kaj ĝiaj specifaj kompare kun aliaj internaciaj kongresoj. La prelegon de Magalhães antaŭis prelego de prof. Halina Swieczkowska pri filozofiaj aspektoj de planlingva kreado.



Gazetara konferenco en Bjalistoko (Fotis Jerzy Koffler)

En kunsido kun profesoro Hanna Konopka, prezidanto de la Komitato de Fondumo Zamenhof, oni traktis la funkciadon de la Fondumo kaj ĝiajn planojn por estonteco. Post 20-jara serĉado de solida bazo por ĝiaj aktivaĵoj oni nun rigardas antaŭen kun optimismo, ĉar verŝajne la Fondumo baldaŭ ricevos propran ejon por starigi Zamenhof-muzeon, ekspozicion, bibliotekon kaj esplorojn pri Esperanto kaj interlingvistiko. La apogon al tiuj planoj kaj al la invito de UK direktoro Buller vidas kiel klaran indikon, ke la nunaj decidfarantoj de la urbo malkovris la unikan potencialon por turismo kaj ekonomio, kiun prezentas la fakto, ke la aŭtoro de Esperanto naskiĝis en Bjalistoko.

GK UEA

## Novaj komisiitoj kaj oficistoj

La nova Estraro de UEA ekokupiĝis pri la lasta stadio de la elektoprocezo en la Asocio, dum kiu ĝi nomumas komisionojn kaj komisiitojn por specifaj laborkampoj. La plenumado de tiu granda tasko postulos plurajn monatojn.

Jam en sia unua kunsido en Jokohamo la Estraro reelektis Humphrey Tonkin (Usono) kaj Michela Lipari (Italio) respektive kiel prezidanton kaj sekretarion de la komisiono pri la **Belartaj Konkursoj** de UEA. Surbaze de ilia propono la Estraro poste nomumos la juĝantojn de unuopaj branĉoj de la Konkursoj.

La komisiono pri **Internacia Kongresa Universitato** konsistas el d-ino

Sabine Fiedler (Germanio), Wen Jingen (Ĉinio), prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Aŭstrio), prof. d-ro Humphrey Tonkin (Usono), kaj prof. d-ro Amri Wandel (Israelo), kiu funkcios kiel nova sekretario de IKU.

Al la estraro de **Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj** (CED) estis elektitaj Humphrey Tonkin (Usono) kiel direktoro, A. Giridhar Rao (Hinda Unio) kiel sekretario, Detlev Blanke (Germanio), Mark Fettes (Kanado), Sabine Fiedler (Germanio), Federico Gobbo (Italio), Kimura Goro (Japanio), kaj estrarano de UEA José Antonio Vergara (Ĉilio).

Komisiito pri la projekto **Indiĝenaj Popoloj** fariĝis Erik Felker (Usono). La Estraro konfirmis ankaŭ la konsistojn de du regionaj komisionoj. Tiun pri la **Afrika Agado** kunordigas Aimé-Florent Ntoto Zola (DR Kongo). La aliaj membroj estas Antoine Kouablan Kouassi (Ebura Bordo), Emile Malanda Nianga (DR Kongo), François Hounsounou (Benino), Jérémie Sabiyumva (Burundio), Adje Adjevi (Togolando), Charles Alofa (Benino), kaj Jean Codjo (Benino/Kanado). Al la komisiono pri **Amerika Agado** apartenas Maritza Gutiérrez (Kubo) kiel kunordiganto, Martin Schaeffer (Germanio/Meksiko), Boris-Antoine Legault (Kanado), James Rezende Piton (Brazilo), Atilio Orellana Rojas (Argentino/Nederlando), Steve Brewer (Usono), kaj Ruben Sanchez (Argentino).

GK UEA

## Simple la plej bona

Mia tre skeptika pola amiko, kiu post dekeljara nepartoprenado en esperantistaj renkontiĝoj venis ĉi-septembre al Poznań por ARKONES, fine estis ne nur kontenta, sed eĉ entuziasma: “Mirinde, ĉu la movado tiel progresis? Ja antaŭe tute ne ekzistis tiaj interesaj renkontiĝoj!”

Eble la movado ne progresas, kaj en Esperantujo ja ne mankas renkontiĝoj seninteresaj, sed ARKONES-23 estis interesa. Interesege.

Efektive, ĝia programo sufiĉus por semajna, sed ne por semajnfina (21–23 sep) renkontiĝo, ja sep muzikaj koncertoj estis ĝueblaj: Anjo Amika, Zuzanna Kornicka, Marteno Minich, Kim Henriksen, Georgo Handzlik, Jomo kaj *Afrika Umba*. Kaj Jarlo Martelmonto kun volontulaj aktoroj prezentis sian novan “elbuŝigaron”.

La longa listo de la prelegantoj similas al paĝo en telefonlibro. Elita telefonlibro, kun Ilona Koutny, Lidia Liĝeża, Zsófia Kóródy, Tomasz Chmielik, István Ertl, Ryszard Rokicki, Edward Malewicz, Stano Marček, Claude Piron... entute 22 prelegantoj. Ne ĉiu el ili prelegis nur unu fojon, kaj kelkaj prezentiĝis ankaŭ alimaniere: Tomasz Chmielik havis jubilean beneficon, kaj Claude Piron renkontiĝis kun legantoj.

La programon kompletigis filmoj, laborgrupoj, fakaj renkontiĝoj, oratora konkurso, kvizo (de Marian Zdankowski, la kvizmajstro de Esperantujo), movada panel-diskuto (kun delegacio Bjalistoka gvidita de la vicurbestro Sosna), prezentiĝoj de eldonejoj kaj gazetoj, mielvespero, diskoteko, libro-servo, ekspozicioj k.m.a.

Ĉi tiuj **ARTaj KON**frontoj en **ES**peranto, kun pli ol 200 partoprenantoj el 25 landoj, havis aŭspicion de la urbestro, Ryszard Grobelny, kaj de UEA, kiun aktive reprezentis ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller.

Mi konfesas, ke nur parteton de la listigitaj (kaj nelistigitaj) programeroj mi partoprenis, ĉar mi jen prelegis, jen prezentis librojn, jen traktis tion kaj alion kun kunlaborantoj, jen babilis kun amikoj, sed — ĉefe — mi akceptadis abonkotizojn. Nova rekordo — 45 abonoj por *La Ondo* dum unu semajnfino. Mi revenos al Poznań post unu jaro, ĉar ARKONES estas simple la plej bona esperantista renkontiĝo el ĉiuj, kiujn mi konas.

**AIKo**



Claude Piron multe laboris en Poznań  
(Fotis Andrzej Sochacki)

## Aŭtuna sesio en UAM

La aŭtuna sesio (14–21 sep 2007) de la Interlingvistikaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań atendis la partoprenantojn kun pli riĉa programo ol kutime, ĉar en la tria jaro de la studoj okazas specialiĝo, ĉi foje pri komunikado, lingvistiko kaj lingvopedagogio.

István Ertl prelegis por ĉiuj pri la nuntempa Esperanto-literaturo kaj analizis kelkajn verkojn. La kurso de la bone konata psikologo kaj verkisto Claude Piron pri psikologiaj aspektoj de komunikado katenis la atenton de la aŭskultantoj. Ilona Koutny, la gvidanto de la Studoj, prezentis lingvistikajn aspektojn de komunikado, i.a. esploris la esperant-lingvan bildon de la mondo.

Enkadre de la lingvopedagogia specialiĝo, destinita al instruantoj kaj instruontoj de esperanto, Katalin Kováts, prizorganto de la elstara instruista forumo *Edukado.net* enkondukis la partoprenantojn al la bazaj faktoroj de lingvoinstruado; kaj Maria Majerczak, metodikistino de la Jagiellona Universitato en Krakovo, traktis metodikon. Al la programo kontribuis ankaŭ Zsófia Kóródy, vicprezidanto de ILEI.

La nuna sesio estis specifa, ĉar la lingvopedagogia specialiĝo realiĝis en la kunlaboro de UAM kun ILEI, kaj pro tio povis aliĝi ankaŭ kromaj partoprenantoj (sep personoj el kvar landoj). La kunordigita instruista trejnado daŭros unu jaron (kun reta konsultiĝo inter la sesioj). Tiuj ĉi kursoj sekvis krome minikurson pri literaturo (István Ertl) kaj pri movadhistorio (Aleksander Korĵenkov) kaj povis aŭskulti donace la aliajn proponitajn kursojn de la Interlingvistikaj Studoj.

**Ilona Koutny**

## Pollandaj eminentuloj

Dum la unua jarduono de ĉi tiu jaro legantoj de retgazeteto *Freŝo* (Olsztyn, Pollando) voĉdonis pri la plej elstaraj agantoj de la jaro 2006 en Pollando. Nur poŝtoj rajtis voĉdoni, kaj ĉirkaŭ 500 legantoj faris tion. La rezulto estis anoncita en ARKONES (Poznań).

Amiko de Esperanto: **Tadeusz Truskolaski** (speciala diplomo), **Wiesława Borczyk** (diplomo)

Esperantisto de la Jaro: **Ireneusz Bobrzak**, **Roman Dobrzyński**, **Edward Kozyra** (diplomoj)

Loka Esperanto-aktivulo: **Jadwiga Wasiuk** (diplomo)

Debuto de la Jaro: **Halina Komar** (diplomo)

Seniluziĝo de la Jaro: **Jerzy Targalski** (mencio)

**Marian Zdankowski**

## Gravaj decidoj en Pollando

Landa kunveno de delegitoj de la Pola Esperanto-Asocio okazis 15–16 sep en Lodzo. Estis elektita la nova estraro de PEA: Halina Komar (prezidanto), Edward Kozyra (vicprezidanto), Robert Kamiński (sekretario), Aleksander Zdechlik (kasisto), Stanisław Mandrak, Łukasz Żebrowski, Henryk Budziałowski, Andrzej Kiszkiel, Andrzej Sochacki (membroj).

La kunveno estis fruktodona. Multe da proponoj kaj projektoj estis akceptitaj de la nova estraro. Oni planis, interalie: organizi Polan Esperanto-Kongreson en Lodzo en 2008; aktive kunlabori kun PEJ; prepari programon por instruado de Esperanto; eldoni *Polan Esperantiston* kiel organon de PEA; organizi kurson pri financaj aferoj.

**Andrzej Sochacki**



La eksa kaj nuna prezidantoj de PEA (Fotis A. Sochacki)



**Vaasa.** Kiujn strategiojn oni havas por elekto de lingvoj? En la svedlingva grupo finlingvaj Sirkka Mattlin, Aila Havia kaj Karita Mård-Miettinen konstatis ke ili elektis la grupon por ke ankaŭ ĝi havu anojn. Krome indas uzi la okazon praktiki la duan nacian lingvon de Finnlando. Aliaj lingvoelektaj kriterioj povas esti laŭ persono, loko aŭ rolo. (AMR)

## Pluraj lingvoj praktike

Esperanto-Asocio de Finnlando realigis 5–7 okt 2007 en la dulingva urbo Vaasa (finne) / Vasa (svede) trilingvan simpozion “Finnlando, Esperanto kaj pluraj lingvoj praktike” kadre de siaj tradiciaj Aŭtunaj Tagoj.

La prezidantino Anna Ritamäki prezentis la ideojn pri interlingvismo, lanĉitajn de Esperantic Studies Foundation; la tradukisto Brian Moon la lingvan praktikon kadre de la Eŭropa Unio; la informa direktorino Hannele Saloranta la lingvan situacion de la urbo; la universitata lektorino Karita Mård-Miettinen la lingvobanadan pedagogion; kaj Jukka Pietiläinen la lingvopolitikajn ideojn de la Esperanto-movado.

Ĉiutagajn lingvoelektojn traktis tri laborgrupoj dividitaj laŭlingve: Esperanta, finna kaj sveda. Inter ĉ. 40 partoprenantoj 3 estis denaskaj svedparolantoj. Por kelkaj Esperanto estis la plej forta lingvo inter la tri lingvoj uzataj.

Sabate realiĝis lingvofestivalo en la urba biblioteko, kie prezentiĝis deko da lingvoj, ankaŭ la situacio en EU kaj Esperanto rete kaj kompare kun la finna lingvo. La nova asista urbestro Kristina Stenman gvidis la urban akcepton, dum kiu la partoprenantoj povis bone manĝi en historialvoka domo. La vesperon finis ĝuinda multlingva koncerto de Jomo. La eventon finis dimanĉa ekskurso kun vizito interalie al la liberarea muzeo Stundars.

**Anna Margareta Ritamäki**

## Doktoriĝo pri Esperanto

Doktoriĝis en la Universitato de Amsterdamo la iama estrarano de Esperanto Nederland kaj de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto en tiu sama universitato.

Por atingi tion Jansen faris esploron pri vortordaj aspektoj troveblaj en la nuntempa, ĵurnalismeca lingvaĵo kaj publikigis pri tio disertacion, kiun li sukcese defendis la 2an de oktobro. La doktoriĝaj akompanantoj estis la profesoroj Hengeveld (por la ĝenerallingvistika parto) kaj Van Oostendorp (por la ĝenerallingvistika kaj por la esperantologia aspektoj). En la doktoriĝa komisiono sidis i.a. prof. Haase de la Universitato de Bamberg, Germanio. La ceremonion ĉeestis pluraj konataj esperantistoj el Nederlando kaj ekstere.

La 283-paĝa disertacio estas verkita en la nederlanda lingvo kaj proponas resumojn en la angla, Esperanta kaj germana lingvoj. Temas pri la dua disertacio pri Esperanton rilatanta temo defendita en nederlanda universitato ene de unu jaro (post Marcus Sikosek, doktoriĝinta en novembro 2006 post esploro pri la historio de UEA), sed pri la unua disertacio post 1947(!), kiu rekte koncernas la lingvon mem. Estas antaŭvideble, ke la Universitato de Amsterdamo baldaŭ nomumos Jansen plenrajta speciala profesoro en la katedro, kiun li de 2004 okupas en la nomo de IEI.

**Atilio Orellana Rojas**

## Konferenco de ĈEA

Ĉeĥa Esperanto-Asocio konferencis 22–24 sep 2007 en Polička (naskiĝa urbeto de komponisto Bohuslav Martinů) en la loka teatro portanta la nomon de klasika ĉeĥa dramverkisto Josef Kajetán Tyl. Venis 101 esperantistoj.

Vendrede vespere franco Hannes Larsson rakontis laŭ lumbildoj, kiel li ellernis Esperanton; poste Petr Chrdle klarigis siajn spertojn pri profesia uzo de Esperanto (en KAVA-PECH), sed ĉefe li prezentis siajn travivaĵojn el Jokohamo en la ĉi-jara UK.

La sabatan laborprogramon inaŭguris la urbestro Jaroslav Martinů per salutparolado kaj la muzeestro Martin Zdražil per rakontado pri la historio de la urbo. Infanoj-esperantistoj el Česká Třebová prezentis kelkajn scenetojn, kantojn kaj dancojn. Poste la asocia prezidantino Jana Melichárková raportis pri la agado de la asocio dum la pasinta jaro. Petr Chrdle informis pri la agado de UEA, SKEF, GEA kaj proponis ĈEA-retkomunikojn al retanoj. Vratislav Hirš klarigis la ekonomian situacion kaj membrobazon de ĈEA.

En diskutoj Miloslav Šváček informis pri IKUE, Dagmar Chvátalová pri Ĉeĥa Esperanto-Junularo, Miroslav Malovec pri *Starto* kaj EK Brno, Miroslava Tomečková pri la asocia libroservo, Pavel Polnický pri KELI kaj abonado de gazetoj, kaj Anna Vyšinková pri la kompletigita listo de la asocia biblioteko.

Posttagmeze, post trarigardo de la urbeto kun konservitaj mezepokaj muregoj kaj preĝeja turo, oni daŭrigis la programon en la Tyl-domo en pluraj ĉambroj samtempe: konkurso *Risku!*, prezentado de la asociaj sekcioj, legado de dramo por du personoj kaj diskuto pri la strategio de Esperanto. La sabata vespero apartenis al dancamuzo kun riĉa tombolo.

La dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al la projektoj *Wikipedia* kaj *Wikimedia*, per lumbildoj estis klarigitaj kiel oni enmetas tekstojn kaj fotojn. Poste la konferenco estis fermita.

**Miroslav Malovec**



Pollando 27.12.2007 - 2.01.2008

## IKEKanoj solidarecas unuanime

La 16a Konferenco de la Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK) okazis 12–16 sep 2007 en ĉeĥia urbeto Dobřichovice, apud Prago, aranĝita per la firmao KAVA-PECH, gvidata de Petro Chrdle.

Ĉeestis seriozaj aktivuloj el malsamaj politikaj tendencoj de frakasita restaĵo de iam tre granda monda komunista movado. Tiu, kiu ankoraŭ defendas Stalinon sidis apud tiu, kiu pasigis jardekojn en trokiismaj organizaĵoj. Tiu, kiu forlasis sian kompartion je 1956, diskutis kun tiu, kiu partoprenis la subpremon de kontraŭevolucio. Intertempe Sovetunio malaperis, venkinta kapitalismo alportis novajn militojn kaj mizeron. Restas aktuala la baza koncepto de marksismo, ke nur klasbatalo de monda laboristaro kun propra partio, per ekstrema demokratio, kapablos savi la homaron el la koŝmaro de klasaj socioj.

Defio staras antaŭ la komunistaj esperantistoj. Ĉu kamaradoj el malsamaj tradicioj toleros unu la alian? Ĉu ni sukcesos kunvivi en sama organizaĵo? Dum ni pridiskutos la hororojn de la dudeka jarcento, ĉu ni kapablos prilabori praktikan programon por la estonta agado? Prave rimarkis k-do Johano Petik, ke mankas klara politika celaro ĉe IKEK.

Feliĉe ni havas komunan lingvon por interparoli — sed pli grava estos kulturo de “ekstrema demokratio” (Karlo Marks). Plimulto decidis kion fari. Malplimulto rajtas daŭre sinesprimi, kaj tial povos fariĝi plimulto.

Sana signo de praktika kunlaboro estis unuanima voko al la esperantistaro subskribi Fundamentan Deklaron de kampanjo HOPI (Hands Off the People of Iran) — Manojn For de la Popolo de Irano. La ĉefaj postuloj de HOPI estas: Ne al imperiisma milito! Ne al la teokrata reĝimo!

Dum Usono kaj Israelo, kun subteno de Britio, preparas terurisman atakon kontraŭ Irano, la teokrata reĝimo en Teherano uzas la militminacon por forpreni la rajtojn kaj akriĝi la ekspluatadon de la popolo. Same faras Bush en Usono. Malgraŭ retoriko pri la usona “Granda Satano”, la religiaj regantoj en Teherano tamen jam delonge aliĝis al la monda kapitalisma klubo kaj trudiĝis al la nova liberala politikon de privatigo kaj merkatiĝo, subpremante la luktojn de la popolo. La veraj kontraŭimperiistoj, la veraj demokratoj, la veraj pacbatalantoj estas la movadoj

laborista, virina kaj studenta, kiuj alfrontas kun kuraĝo kaj imperiisman militminacon kaj terurisman reĝimon. Luktanta popolo bezonas nian solidaricon. La esperantistaro ne restu neŭtrala.

Elektiĝis kvinpersona estraro, kiu post la konferenco mem elektis la postenulojn de IKEK. Restas la samaj redaktoro de *Internaciisto* Luis Serrano Pérez (Hispanio), prezidanto Stan Keable (Britio), sekretario Dieter Rooke (Svisio) kaj kasisto — ne estante estrarano — Alcino Alves Ramos (Portugalia). Aldoniĝas du vicprezidantoj: Johano Petik (Hungario) kaj Marija Prilepskaja (Ruslando).

Venontjare okazos grava demokratio elpaŝo postulata de ruslandaj kamaradoj, por inkludi tiujn malriĉulojn, kiuj ne povas pagi por ĉeesti konferencon. Antaŭ komenco de nia 17a konferenco (2008), elektiĝos estraro per baloto de membraro, anstataŭ kutima voĉdonado ĉe konferenco. Sendube partopreno de ĉiu membro estos saniga afero, ĉar devos esti prezentita publike la politika sinteno de ĉiu kandidato. Voĉdonos nur membroj — tiuj kiuj akceptas statuton, petas membrecon kaj pagas membrotizon.

**Stano Keable**

## IJK 2008 en Hungario

La sekva IJK okazos en Hungario, en la urbo Szombathely, inter 26 jul kaj 2 aŭg 2008, decidis TEJO-estraro. Hungara organiza teamo, kun helpo de internaciaj geamikoj, prilaboras repaĝaron kun pli da informoj — kotizoj, ejoj, programo, ekskursoj. Rezervu tempon por IJK-umi, kaj revenu ĉi tien por sekvi novaĵojn!

Szombathely [ːsombathej] situas ĉe la okcidenta landlimo de Hungario. Ĝi estas regiona centro kun ĉ. 80 mil enloĝantoj, kun riĉa kultura vivo. La urbo estis fondita antaŭ 2000 jaroj, fare de pensionigitaj romiaj soldatoj — la kulto de la romiaj tempoj ankaŭ nuntempe estas ege grava.

Szombathely estas facile atingebla de Vieno, Graz (Aŭstrio) kaj Budapeŝto (per rektaj trajnoj).

Ĉar Szombathely estas landlima urbo, malfermita al aliaj kulturoj: ekzistas ĉi tie tri minoritataj urboregistroj (kroata, cigana, germana), kaj ofte oni okazigas minoritatajn festivalojn. Tio estas aparte grava el la vidpunkto de la IJK, ja la jaro 2008 estas la jaro de Interkulturaj Dialogoj.

Laŭ [www.tejo.org](http://www.tejo.org)



InPaSem 07. Dan Mrázek ĉiĉeronas en la ĉefurbo de Ĉeĥio. (Fotis Petro Chrdle)

## InPaSem — Semajno, kiu plaĉas

Internacia Paroliga Semajno InPaSem 07 okazis tradicie en Dobřichovice apud Prago la lastan semajnon de septembro. Partoprenis 23 personoj el kvin landoj (plej multnombrian grupon kreis kiel ĉiujare francoj, krome partoprenis ankaŭ ĉeĥoj, slovakoj, germanoj kaj svisoj).

La programo de InPaSem havas jam dum pluraj jaroj sian senŝanĝan preskaŭ ritan konsiston, kiu plaĉas al la partoprenantoj, do ne estas kialo ĝin ŝanĝi.

Jen: lunde alveno kaj posttagmeze la konatiĝo, disdivido en grupojn al komencintoj kaj jamaj parolantoj kaj ankaŭ la unuaj lecionoj, vespero libera. De mardo ĝis dimanĉo ekde la 9a ĝis la 12a horo lecionoj en la kurso de komencintoj kaj gvidata konversacio en la seminarioj por jamaj parolantoj, sekve komuna antaŭtagmanĝa dudekminuta kantado. Post la tagmanĝo ĉiutage turisma programo: esploro de Prago kaj de Bohemia Karsto sub la gvido de esperantlingva ĉiĉerono, sabate renkontiĝo kun lokaj esperantistoj en la formo de amuza posttagmezo, dum kiu oni povas montri siajn artajn kapablojn prezentante skeĉojn, kantante, deklamante, ktp. kun sekva libera babilado kaj promeno tra Dobřichovice.

La kurson por komencintoj gvidis kiel ĉiujare Stano Marček (SK) uzante sian propran rektan metodon, la konversacian seminarion gvidis Marek Blahuš, parte ankaŭ Petro Chrdle, tra Prago ĉiĉeronis Dan Mrázek, tra la Bohemia Karsto Petro Chrdle. Fine de la semajno ĉiu partopreninto ricevis la memordiplomon.

InPaSem 08 okazos 6–12 okt 2008 denove en Dobřichovice.

**Petro Chrdle**

## La Ratkaptista Bando jubileas

Okaze de sia 20-jariĝo la Esperanto-grupo *La Ratkaptista Bando* (Hameln, Germanio) invitis 23 sep por la kvara Rata Rendevuo. Trideko da samideanoj el Germanio kaj Nederlando venis al la jubilea RR, kaj multaj diverslandaj amikoj sendis gratulojn.

Post bonvenigo kaj kafumado Christian Grundmann gvidis nin tra sia unika privata kolekto de malnovaj Volkswagen-aŭtoj (“VW-Käfer” kaj “VW-Bullis”) en Hessisch Oldendorf, kaj la partoprenantoj ege admiris, kion entute lia patro kaj li kolektis kaj renovigis dum jaroj. (Unu aŭto el la kolekto mankis, ĉar ĝi estis ĵus forluita al Berlino, kiel rekvizito por la filmo *Valkyrie* de Tom Cruise.)

En la tagmanĝo la grupo Subvisurgo transdonis kiel donacon belan fotolibron kaj botelon de Vezer-akvo, kiu tiamaniere revenis de la Suba Vezero denove al la Supra Vezero. Post la tagmanĝo ni veturis al la vilaĝo Fischbeck. La pli ol 1000-jara monaĥinejo impresis nin per siaj artotrezoroj.

Sed la kulmino de la 20-jariĝa festo estis la koncerto de la nederlanda grupo *Kajto* en la preĝejo en Fuhlen por cento da vizitantoj, ankaŭ neesperantistoj. Ankie van der Meer, Marian Nesse, Marita Kruijswijk kaj Nanne Kalma ne nur kantis profesie klare kaj pure kaj akompanis sin en diversaj variaĵoj per gitaroj, flutoj, ŝalmoj kaj akordeono, ili fascinis la publikon kaj animigis al kunkantado.

Estis neforgesebla vespero, kiu ne povintus okazi sen la financa subteno de *Sparkaso Weserbergland*.

**Heinz W. Sprick**

## Ĉiam pli Esperanta urbo

### Nova Esperanto-ŝildo

Komence de oktobro 2007 oni inaŭguris novan ŝildon de la urba biblioteko en la Esperanto-urbo Herzberg en la lingvoj germana kaj Esperanto. En ĉi tiu biblioteko dum pli ol dek jaroj la Esperanto-grupo organizas lingvokursojn kaj studsesiojn.

La bibliotekestrino Rosemarie Matwijow tre ĝojis pri la alloga dulingva ŝildo. Libropetantoj ankaŭ ricevas bazajn informojn pri Esperanto. Krome Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar donacis inform- kaj lernolibrojn por la biblioteko. La regiona gazeto informis pri la dulingva ŝildo de la biblioteko.

Ankoraŭ estos longa vojo ĝis ankaŭ aliaj institucioj en la Esperanto-urbo havos dulingvajn ŝildojn. Kvankam la urba administracio ŝatas akceli la esperantigon en la urbo tamen mankas la financaj eblecoj. Estas multaj realigendaj ideoj, sed homfortoj kaj financaj eblecoj estas limigitaj. La Esperanto-movado havas unikan ŝancon montri al la publiko (ekstera mondo), ke Esperanto reale ekzistas. Sponzoroj povus multe helpi.

### Instrui pli altkvalite

Jam la trian fojon okazis komence de oktobro 2007 en Herzberg la Tutlandaj Pedagogiaj Tagoj (TORPEDO 3). La trejnsesio traktis tri grandajn temojn: situaci-komunika instruado, pluklerigado de ekzamenantoj, kaj la utiligo de interreto por instruado.

Prelegis kaj aktivigan trejnkurson gvidis Stefan MacGill pri amuzaj kaj modernaj instrumentoj. La baza materialo por tiu kurso estis lia nova

instrulibro *Nemave edifi*, kies riĉa kaj humorplena enhavo ravis la partoprenantojn.

Gerald Tucker (fakestro pri ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto) prezentis la ekzameneblecojn de GEI kaj informis pri novaĵoj en la trinivela ekzamensistemo. En la sekvaj diskutoj la partoprenintoj emfazis, ke estonte oni uzu en Germanio ankaŭ la eblecojn laŭ la nova Referenckadro por lingvoekzamenoj de Eŭropa Konsilio. Estos avantaĝe kaj por la ekzamenantoj kaj por la lingvo Esperanto, se estonte okazos kompareblaj kaj samvalidaj lingvoekzamenoj.

Aliaj prelegantoj estis Zsófia Kóródy, kiu gvidis ankaŭ la kunsidon de AGEI, germana landa sekcio de ILEI. Christof Krick kaj Helmut Sebastian prelegis pri gramatikaj temoj. Chuck Smith tre interese laborigis ĉiujn en sia trejnkurso kaj donis detalajn informojn pri Vikipedio.

Okazis ankaŭ iom da distrado: urborigardado, filmprezentado, komuna vespermanĝo, aŭkcio de libroj, kaj sabatvespere prelegis konata faklibroaŭtoro Harald Schicke pri bierkulturo.

La kvintaga fakseminario kun 30 partoprenantoj estis taŭga forumo ankaŭ por personaj interparoloj, planoj (ekz. por kunordigita agado de lernejaraj grupoj). Laŭtradicie ĉiu partoprenanto kontribuas al la programo per prezentado de kunportita instrumaterialo, instruhelpiloj, raporto pri sia E-instruado, rezultoj, fiaskoj, problemoj, sukcesoj, ktp.

**ICH**

## Ekzameniĝi novjarfeste

Dum la Internacia Seminario 2007/08 en Würzburg (Germanio) okazos la internaciaj ekzamenoj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj UEA je elementa nivelo. Notu ke tiuj ekzamenoj nur malofte okazas, interalie, ĉar oni devas anonci ilin tri monatojn antaŭ la ekzamensesio. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika antaŭtesto kaj skriba kaj parola partoj.

Pli da ĝeneralaj informoj pri la enhavo kaj kondiĉoj troviĝas en la retejo: <http://www.edukado.net/pagina/Internaciaj+Ekzamenoj/150/>. Detalajn demandojn kaj aliĝon sendu al Zsófia Kóródy ([esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)).

Informon pri aliĝo por la Internacia Seminario ĉerpu rete en: <http://www.internacia-seminario.de>

**Elisabeth Laika**





## En la Federacia Distrikto

Pli ol cent personoj kunvenis 16 okt 2007 okaze de la 10a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga. Taguatinga — kun pli ol 200 mil loĝantoj — estas unu el la 26 administraj regionoj de la ĉefurbo de Brazilo. La 10an ERT gastigis aŭditorio de la regionestro.

Pri la temo *Esperanto en la Federacia Distrikto* parolis reprezentantoj de diversaj Esperanto-nukleoj starigitaj en la ĉefurbo de Brazilo, nome: Sufia Alves Lima (prezidanto de Taguatinga Esperanto-Klubo), profesoro Adair de Arede Vasconcelos (direktoro de la lernejo *Lazaro Ludoviko Zamenhof*), profesoro Wilson Álvares de Oliveira (prezidanto de Esperanto-Asocio de Braziljo), Paulo Pereira Nascente (profesoro de Esperanto-Kurso de Universitato de Braziljo), Giuseppe Grattapaglia (direktoro de *Bona Espero*). José Carlos Dorini Ramos (eksdirektoro de la centra oficejo de Brazila Esperanto-Ligo) resume parolis pri la influado de naciaj Esperantaj organizoj sur la lokan Esperanto-Movadon.

En la arta parto okazis deklamadoj, teatro, kantoj kaj pianludado.

**Carlos Maria**

## Esperanto kaj la infano

Proksime de Rio-de-Janeiro troviĝas ebena regiono Baixada Fluminense. La lastan aŭgustan dimanĉon en Nova Iguaçu, unu el la urboj de tiu regiono, okazis la 3a Esperantista Renkontiĝo de Baixada Fluminense, kun ĉirkaŭ cent esperantistoj.

La eventon, kies temo estis *Esperanto kaj la infano: semoj por estonteco de paco*, malfermis veterana esperantisto Daniel Peliz, kaj Aldenora Mercês Mendonça donis ĝeneralajn informojn pri la movado en la regiono kaj tuj poste ŝi kantigis la ĉeestantaron.

Aloísio Sartorato prelegis pri la historio de Esperanto, poste sian artan talenton montris pluraj geknaboj, kiuj studas Esperanton, kaj du kantistoj, kiuj akompanis sin per gitaro kaj kantis brazilajn kanzonojn en Esperanto.

Givanildo Ramos Costa babilis kun la ĉeestantoj pri movadaj aferoj. Poste la partoprenantoj dividiĝis en tri grupojn: unu sekvis fulmrapidan bazan kurson gviditan de Givanildo, alia paroligan rondon gviditan de Daniel Peliz kaj tria atente aŭskultis la konsilojn de Jair Salles pri instruado.

La renkontiĝon kronis komuna kantado de *La Espero*.

**Aloísio Sartorato**



Geknaboj el la lernejo *L. L. Zamenhof* teatrumas en Taguatinga.

## Esperanto sonas en la Valo

30 sep okazis la 69a Renkonto de Esperantistoj de la Paraiba Valo en la turisma agrabla urbo Caraguatatuba.

Ĉirkaŭ kvindek homoj aŭskultis altnivelajn prelegojn pri la brazila himno (Sylla Chaves), pri meditado (d-ro Elmir Lima), pri astrofiziko (Genildo Coelho), pri NIFOJ (Luiz Alberto Coelho) kaj pri la vojaĝo de BEJO-ataŝeo (Lucas Vignoli).

Krome, okazis kortuŝa omaĝo al la ĵus forpasinta esperantistino Elvira Fontes kaj informoj de la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo. José Tenório montris kaj disdonis la novan riĉenhavan numeron de la revuo *BRAZILEI*. Fine oni aŭskultis kantojn kaj recitalon de gitarensemblo, kiun konsistigas gejunuloj el Caraguatatuba.

**Paulo Sérgio Viana**

## ZOMAER — la unua provo

La movado en la brazila ŝtato Minas Gerais viglas. 16 sep 103 gesperantistoj el 22 urboj de Minas Gerais, Rio de Janeiro, São Paulo renkontiĝis en Juiz de Fora, Minas Gerais por la unua ZOMAER — Zona da Mata Esperanto-Renkontiĝo — en la sidejo de Associação Cultural Brasil Estados Unidos.

La programo enhavis prelegojn, prezentadon de la filmoj *Esperanto Respeito em Todas as Línguas* kaj *Garda Malaperis*, lecionojn, muzikojn, poeziaĵojn kaj skeĉon en Esperanto.

Ĉe la fino post la transdono de la Renkontiĝa flago al la reprezentanto de Ubá, kiu gastigos venontjare la 2-an ZOMAER, ĉiuj kantis la himnon *La Espero*.

**Aloísio Sartorato**

## NOREK: Polusaj regionoj

Nord-Pacifika Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco, komenciĝis 21 sep (vendrede) en Sidney (Brita Kolumbio, Kanado). Vespere ĉiuj kune ĝuis trihoran babiladon, kantadon en akompano de gitaro, kaj frandadon.

La serioza parto de NOREK okupis la tutan sabaton (22 sep). La ĉeftemo kongruis kun la ĉi-jara temo de UNESCO, *Polusaj regionoj*. Tri programeroj rilatis rekte al la temo.

— Filmo *Ĉirkaŭpolusaj ursoj* (ĝi espereble iĝos la unua produkto rezultonta el la kunlaboro de *Karvonen Films* kaj UEA).

— Jane Sloan kolektis informojn pri la planita sed tamen nuligita scienca (?) vojaĝo al la centro de la Tero, la “truo” ie en la regiono de la Norda Poluso (kredu aŭ ne).

— Olga du Temple parolis pri faktoj kaj teorioj rilatantaj al la geografiaj kaj magnetaj polusoj.

La aliaj prelegoj estis variaj kaj interesaj:

— Ralph Gonyea, kiu mem estis armea klarinetisto, rakontis pri klariono, ĝia historio kaj ĝia nuntempa uzo en armeoj de Usono kaj Kanado, kaj ĝiaj melodiaj ludataj en la soldatejoj.

— Erna Sheppard, denaska germanino kaj sperta tradukanto, montris la gravecon de intima kono de la t.n. unua lingvo por perfekta transigo de la “interna ideo” en tradukoj de poemoj kaj kantoj.

— Anna Bennett instruis pri uzo de *paca parolo* en konfliktaj situacioj.

— Andrew Sly, volontulo en *Guttenberg Project*, varbis novajn volontulojn por enkomputerigo de Esperantlingvaj libroj. La nuna celo estas envicigo de Esperanto inter la “plej uzataj lingvoj”, en kiuj estas pli ol 50 librotekstoj haveblaj.

En aparta ejo okazis samtempe “Lingva ateliero” — docento Brian Kaneen gvidis grupon de la NOREK-anoj, kies lingvoscio estas “meznivela”, al pli bona parolkapablo.

Dimanĉo estis dediĉita al movadaj aferoj: la UK en Jokohamo, oficejo de “Esperanto USA”, redaktado de *Lumo*, kluba vivo en Calgary kaj Seattle, stato de KEA. Leland Ross akceptis respondecon pri organizado de NOREK 2008 en la insulo Orcas, en la pitoreska arkipelago parte Usona kaj parte Kanada. Tie fakte estas la “lulilo” de la Usona Esperantistaro (oni parolis tie en Esperanto jam antaŭ pli ol cent jaroj).

**Olga du Temple**

## Ago-tago en Italio

La partopreno de italaĵ esperantistoj al la informaj agadoj dum la sabato (6 okt) kaj la dimanĉo (7 okt) okaze de la Ago-tago 2007 estis bon-nivela.

En kelkaj urboj oni aranĝis la tradiciajn informajn budojn en ĉefaj stratoj. Tipa ekzemplo estis tiu de Milano. De la 9a horo matene ĝis la 18a almenaŭ ses milananoj deĵoris ĉe la tablo pretigita per eta ekspozicio por disdoni flugfoliojn kaj diversan informan materialon kaj por respondi al la pluraj demandoj de la scivolemaj pasantoj. Kompreneble la interesitaj vizitantoj estis pli multnombraj dum la posttagmezaj horoj. Iom surprizis la konstato ke la plejmulto de la interesitoj ne estis milananoj kaj ke inter ili ĉeestis sufiĉa kvanto da fremduloj, ĉi tie pro turismaj kialoj aŭ ofte kiel enmigrintoj.

En Florenco anoj de la Florenca Esperanto-Klubo partoprenis en festo de la studrondoj de la urbo, ĉar ili aranĝas studrondon pri Esperanto, la lingvo de paco, subtenata de la urbo. Ili disdonis informan materialon kaj legis en Esperanto la *Kanton de la kreitaĵoj* de Sankta Francisko el Asisi.

Ankoraŭ pli impona estis la partopreno de esperantistoj, ĉefe el la regiono Marke, al la tradicia pac-marŝo inter Peruĝa kaj Asisi. La esperantistoj partoprenis la marŝadon malantaŭ propra tre videbla banderolo. Miloĵ da flugfolioj estis disdonitaj al la ceteraj partoprenintoj. Andrea Montagner kaj Marco Menghini, konsilantoj de Itala Esperanto-Federacio, estis inter la gvidantoj de la Esperanto-partoprenantaro. Pluraj kunmarŝantoj demandis pri Esperanto kaj volis esti informitaj kaj ricevi plian materialon. Inter ili estis konata itala misiisto, Alex Zanotelli, tre aktiva organizanto de alternativaj iniciatoj. La mesaĝo de la Esperantomovado pri demokratiaj rajtoj ankaŭ en la lingva kampo estis aparte ŝatata.

**Renato Corsetti**

13 okt en Tehrano forpasis

**Aref Azari (1924–2007)**

diplomita inĝeniero, li dum multaj jaroj laboris en Usono kaj Germanio, poste en Irano kiel direktoro en kelkaj fabrikoj. Esperantisto de la junaĝo, li aktivigis en 1976, gvidis kursojn kaj fine dediĉis sin al vortara laboro. En 2000 aperis lia *Ampleksa Esperantopersa vortaro*. Honora membro de UEA, honora prezidanto de Irana Esperanto-Asocio.

*Ni funebras kaj kondolencas.*



Esperanto-stando en Kopenhago

## Lingvaj rajtoj por ĉiuj

15 sep Kopenhaga Esperanto-Klubo en kunlaboro kun la Gronlanda Domo okazigis la duan lingvofestivalon. Ĝi ofertis prelegojn pri lingvoj, budojn kaj standojn kun libroj, periodaĵoj, sonbendoj, muziko kaj kantoj. Oni montris filmojn kaj Esperantan lingvan konkurson kun premioj. Oni povis konatiĝi kun preskaŭ dudeko da lingvoj, inkluzive de Esperanto.

La prilingvaj duonhoraj prelegoj okazis paralele en pluraj ĉambroj. Oni povis aŭskulti la grupon *Esperanto Desperado* kaj aliajn muzikistojn.

La iniciato celis egalrajtigi la lingvojn kaj montri la lingvan diversecon en la mondo. La slogano de la festivalo estis *Lingvo kiel riĉfonto — ne kiel problemo*, emfazante lingvaj rajtojn por ĉiuj, sendepende de nombro de parolantoj kaj la fakton ke se malaperas lingvo, malaperas kulturo.

Post la lingvofestivalo ni sukcese partoprenis la Danan Socian Forumon kun budo kaj prelego (28–30 sep), Foiiron en Odense kun budo (5–7 okt), kaj la tradician Kulturajn Nokton en Kopenhago kun budo (12 okt).

Sekve de la ago-semajnoj ni jam komencis kurson en Kopenhago kaj aranĝos kurson en Odense.

**Ileana Schrøder**

## RAI: Ĝis ne-reaŭdo!

Ekde 1 okt la Itala Radio (RAI Internacia) ĉesas elsendi kurtondajn radioprogramojn al eksterlando.

Tio koncernas ĉiujn programojn en ĉiuj lingvoj, escepte (onidire, ĉar nenio estis anoncita, ĉu oficiale ĉu duonoficiale) de la itala, angla, franca, kaj eble germana kaj hispana, kiuj restos, sed nur satelite kaj interrete.

Mi registris la lastan programon en Esperanto, kies lastaj vortoj estas: “Ĝis ne-reaŭdo; nia programo en Esperanto estas finita”.

**Antonio De Salvo**

tradukisto-anoncisto de la Esperanto-programo de 1971 ĝis 2007

## LEĴA: Ambicia asocio fondita

20 sep en Vilno okazis fonda kunveno de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio (LEĴA). La kunvenon partoprenis 15 profesiaj kaj praktikantaj ĵurnalistoj-esperantistoj. Tiu ĉi asocio fariĝos asocia membro kaj de Litova Ĵurnalista Asocio kaj de Litova Esperanto-Asocio.

Estas elektita 5-membra Estraro de LEĴA, kun konata gvidanto de radiaj kaj televidaj elsendoj Audrys Antanaitis kiel prezidanto.

LEĴA kunigos ne nur profesiajn ĵurnalistojn, sed ankaŭ praktikantajn kaj subtenantojn. Ĝi havas ambiciajn planojn: organizi kursojn de Esperanto por ĵurnalistoj, aranĝi profesion instruadon, popularigi Esperanton, kunlabori kun ĵurnalistoj-esperantistoj de aliaj landoj, plenumi komunajn projektojn, partopreni diversajn aranĝojn. Ĝi deziras havi kunlaborajn rilatojn kun Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA).

En la decembraĵ Zamenhof-Tagoj en Kaŭno LEĴA intencas prezenti sian programon kaj ideojn.

LEĴA intencas organizi mondkongreson de ĵurnalistoj-esperantistoj 26–30 maj 2008 en Vilno. Ĉi tiu kongreso estos ankaŭ bona okazo por solvi nunajn problemojn de TEĴA.

**Povilas Jegerovas**

## Liaoning: 400 + 118 + 80

400 studentoj en nova semestro elektis Esperanton kiel nedevigan studobjekton en kvar kursoj, funkciigitaj en Shenyang Universitato.

Krome, 118 studentoj anoncis sin por du Esperanto-kursoj en Liaoning Universitato, sidejo de LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio), kaj 80 studentoj aliĝis al kurso de Evolu Historia de Esperanto en la sama universitato.

La estraro de LEA post la Jokohama UK decidis elekti instruistojn por aliaj universitatoj, kiuj intencas enkonduki Esperanton en ĉi tiu semestro. Por la instruado estos represitaj 1000 lernolibroj *La Nova Jarcento*.

En la Liaoning Universitato oni provos Masanori-Metodon de Esperanto-instruado, akiritan de s-ro Nakatu Masanori en la urbo Takatuki post la 92a UK. En la venonta estrara kunveno oni serioze diskutos pri uzado de novaj instruaj materialoj ricevitaj dum la 92a UK: *Esperanto per Rekta Metodo, Tinĉjo en Tibeto* ktp.

**Wu Guojiang**

## MontKabana Renkontiĝo ĉe maro

MKR estas tradicia renkontiĝo por esperantistoj-montmigremuloj, kiu dum 17 jaroj gvidis partoprenantojn tra multaj montoj en Aŭstrio, Kroatio kaj Slovenio, kaj de kelkaj el tiuj montoj videblis maro, sed tamen nur en fora malproksimeco.

Ĉi-jare estis tute male, la partoprenantoj estis ĉirkaŭitaj per maro, Adriatiko, je ĉiuj flankoj, ĉar la aranĝo okazis sur kroata insulo Cres!

Insulo Cres neniam estas inundita per turistoj: kvankam ĝi estas la plej granda adriatika insulo ĝi ne havas grandajn hotelojn, sablajn plaĝojn aŭ vaste konatajn kulturajn aŭ historiajn monumentojn ... tamen, ĝi estas tre estimata inter tiel nomataj “ekologiaj turistoj” pro sia malmulte tuŝita naturo kaj ankoraŭ bone videbla tradicia vivo.

La aranĝo okazis dum la lasta septembra semajnfino en vilaĝo Beli, loĝata ekde antaŭromiaj tempoj, sed ĝi nun havas nur dudek permanentajn enloĝantojn kaj unu pensionon kiu gastigis MKR-anojn. Kaj, spite al apenaŭ finita somero, la vilaĝo kaj la insulo mem aspektis tute malplenaj kun apenaŭ kelkaj videblaj turistoj.

MKR-organizantoj ĉi-jare kunlaboris kun du lokaj ekologiaj asocioj. La unua estas “Caput insulae”, kiu celas protekti tre maloftan kadavromanĝantan birdon vulturo, kies lasta habitato en Kroatio troviĝas ĝuste sur la insulo Cres; la alia estas “Eko centar Pernat”, kiu celas revivigi centran parton de Cres kunigante tradicion vivmanieron kaj nuntempon. Partoprenantoj povis viziti ekspoziciojn pri la insulo kaj la vivo sur ĝi, aŭskulti lokan popolan muzikon luditan per tradicia instrumento “meh” kaj gustumi freŝe bakitan panon kun olivoj el hejma forno.

Tamen la programo konsistis ĉefe el migradoj laŭ interesaj vojoj tra duon-insuloj Tramuntana kaj Pernat, kiuj gvidis tra forlasitaj vilaĝoj, interesaj labirintoj, nekutimaj flakoj ... Ne mankis pintoj (plej alta estis Helm, 480 m) kaj eblis naĝi en la maro.

Ĉi-jare venis 43 personoj el dek landoj. Estas rimarkinde, ke dum la lastaj tri jaroj MKR-on partoprenas esperantistoj el dek landoj. Preskaŭ 20% da partoprenantoj estis infanoj. Kvar personoj venis per biciklo: tri germanoj kaj unu nederlandano.

Venontjare MKR vizitos denove Slovenion kaj altajn pintojn de Juliaj Alpoj.

**Vanja Radovanović**



Diverslandaj kaj diverslingvaj MKRanoj

## La pejzaĝo kun birdetoj

Krakova Societo *Espero* organizis Montaran Esperantan Septembron en Zawoja dum la unuaj septembra tagodeko. Ĉi tiu pitoreska loko proksime de Babia Góra (Virinaĉa Monto), la plej longa vilaĝo en Pollando estis ideala por la partoprenantoj, venintaj el Pollando, Finnlando kaj Danlando.

La ĉefan organizan penon prenis al si Grażyna Porada. Pri niaj stomakoj zorgis Maria Malik. Pri turismaj aferoj respondecis Zbigniew Duda. Kantojn instruis Urszula Giercarz. Kursojn gvidis Lidia Ligeża kaj ankaŭ ne plendis pro manko de la geĉeestantoj.

La vetero malebligis realigi ĉiujn turismajn planojn, sed ni sukcesis esti sur Virinaĉa Monto, en subĉiela muzeo en Zawoja Markowa kaj sur Przysłop. Ni havis ankaŭ bivak-fajron kun bongustegaj viandaĵoj.

Centro de la Popola Ludilfarado en vilaĝo Stryszawa pretigis al ni eksterordinaran amuzon — kolorigadon de ankoraŭ krudaj lignaj birdetoj. Ĉiu ricevis birdeton, peniketon, eblecon trempi ĝin en sep ujojn kun diversaj farboj, post kio povis laŭ la memoro, aŭ laŭ la fantazio pentri la propran verkon. Vidinte ekspozicion de la popolaj, religiaj skulptaĵoj ni vizitis plej grandan kaj plej malnovan en la regiono, belan drinkejon en Sucha Beskidzka.

La ekskurso al Oravice (Slovakio) ni faris pro moderne kaj inventeme konstruita Bancentro, en kiu oni utiligas varmajn fontojn.

Vespere kaj en aliaj liberaj momentoj floris la socia vivo apogata je slovakaj kaj polaj fortaj fluaĵoj, sed en tute modera kvanto. Oni ankaŭ kartludis kaj tablotenis.

**Lidia Ligeża**

## Festivalo de 36 lingvoj

22–30 sep 2007 en Bydgoszcz okazis la 32a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kune kun 28a Pola AIS-Sesio kaj la 32a sesio de AIS Klerigejo en Bydgoszcz. La Forumo kaj la sesiojn partoprenis prelegantoj, studentoj kaj gastoj el 21 landoj de Afriko, Ameriko, Azio kaj Eŭropo.

Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj (26 sep) okazis seminario en la Muzeo de Diplomatio, kiun gvidis direktoro de la muzeo, prof. Adam Sudol, kaj prof. Andrzej Dyszak — direktoro de la Centro pri instruado de la pola lingvo por eksterlandanoj en la Universitato Kazimiro la Granda en Bydgoszcz.

La Forumo transformiĝis al festivalo de 36 lingvoj, inter kiuj multaj afrikaj kaj aziaj lingvoj, kiujn denaske parolas studentoj de ISTK.

Okaze de Monda Tago de Turismo (27 sep) studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) kune kun gastoj vizitis la skvaron Zamenhof kaj promenis laŭ la bulvaro Esperanto. En la urbodomo ĉiujn akceptis la urbestro, Konstanty Dombrowicz. Studentoj de ISTK pasigis internacian vesperon en la Ekonomia Altlernejo kun ties studentoj, kie prezentiĝis ISTK-ensamloj *Afrika Umba* (afrika) kaj *Valdo* (kazaha-kameruna).

La lastan vesperon okazis renkontiĝo kun Andrzej Grzębowski, kiu vizitis 170 landojn kaj jam ok fojojn vojaĝis ĉirkaŭ la mondo.

La programo enhavis ankaŭ bakalaŭran-magistran seminarion de AIS kaj ĝeneralan kunvenon de la membroj de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz.

**Andrzej Grzębowski**

## Unufraze

★ La Esperanta Civito estis oficiale invitita al la 4a Internacia Renkonto de la Konferenco de UN pri komerco, ekonomio k evoluigo, okazonta en Nov-Jorko meze de novembro 2007. (HeKo)

★ Kataluna E-Asocio havis budon en la Asoci-Foiro en Barcelono, okaze de la nacia tago de Katalunio 11 sep; disvendiĝis preskaŭ la tuta lernomaterialo; en la posttagmeza manifestacio centoj da flugfolioj estis disdonitaj. (*Kataluna Esperantisto*)

★ En septembro E-standoj funkciis en la 13a Internacia Foiro en Rio-de-Ĵaneiro k en la 26a Librofoiro en Braziljo. (*BEL Informas*)

★ Munkenaj esperantistoj k gastoj el Brazilo, Francio, Ĉeĥio, Pollando, Irano k Singapuro ĉeestis la faman Oktobrofeston en la ĉefurbo de Bavario per propra E-tendo k du grandaj afiŝoj. (Fritz Hilpert)

★ 15 okt en Universitato pri lingvoj k komunikosciencoj en Milano komenciĝis Internacia Semajno de la E-Biblioteko, dum kiu ĉiutage estas montrata unu filmo en/pri Eo. (HeKo)

★ Eo iĝis la deka lingvo elektebla dum ŝip-promenado tra Strasburgo (Francio) en ĉiuj tegmentohavaj ŝipoj; sentegmentaj ŝipoj ricevos ĝin post adaptiĝo de la sonsistemo. (Esper-German)

★ Sub la kunordigo de prof Herbert Andreas Welker k instruado fare de prof. Paulo Nascentes malfermiĝis kurso de esperantologio en la universitato de Braziljo. (*BEL Informas*)

★ Pli ol 20 studentoj ekstudis Eon en la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko; ĝin gvidas Daniel Moreno k Hugo Gonzalez. (Luis Cordova Arellano)

★ Post enkonduka lekcio en la fakultato pri lingvistiko k tradukado de la Ĉeljabinska Ŝtata Universitato (Ruslando) kvindek studentoj aliĝis al E-kurso kiun gvidas Vjaĉeslav Rojdestvenskij. (Esperanto-rus-informoj)

★ La junulara organizo *Edukado ĉe Interreto*, E@I (konata en la movado pro ilia origina nomo “E-o ĉe Interreto”) en septembro estis akceptita de Eŭropa Junulara Fondaĵo kiel internacia junulara organizo aganta Eŭrop-skale. (Ret-info)

★ B. Padmaravi Rodrigo k Shanika Gunasekara gvidas E-kurson por infanoj en Srilanko k planas eldoni ĉi-jare lerno- k lego-librojn. (*Esperanto en Azio*)



**Velura Sezono:** Maria Kočetkova (Ruslando) kantas ĉe lignofajro.

## Nemere — nobel-kandidato 2007

La abonantaro de *Literatura Foiro* estos konsultita per referendumo por elekti la esperantlingvan kandidaton al la literatura Nobel-premio 2008. Tion decidis la Asembleo de la Esperanta PEN, kiu ankaŭ diskonigas la nomon de la kandidato proponita por 2007: **István Nemere**.

La Asembleo estis precipe dediĉita al la venontjara regiona eŭropa konferenco, organizata kun KCE en Ĉaŭdefono 6–11 jul 2008. En la PEN-mondkongreso en Kolombio nia literaturo estos reprezentata de Koffi Gbeglo, kondiĉe ke la Londona centralo konsentos financi liajn kostojn.

La Asembleo akceptis la proponon de la Komitato diversiĝi nian ĉeeston — ĉiam prioritare, sed ne jam ekskluzive en la PEN-medio. En tiu perspektivo situas la aliĝo al WA LTIC, kaj ankaŭ la ĉeesto en literaturfestivaloj.

La Komitato kaj la revizoroj estis reelektitaj por la nova mandato, sed kun la interkonsento ke la Komitato bloke demisios venontjare.

HeKo

## Nederlanda Studotago

La Nederlanda ILEI-Sekcio (NGGE) okazigis 6 okt 2007 sian jam tradician Studotagon en la sidejo de la Internacia Esperanto-Instituto.

Ĉi-jare la temo estis “Azia uzo de Esperanto” kaj kiel ĉefpreleganto estis s-ino Kimie Markarian, japandevena esperantisto el Britio. Parolis pri siaj spertoj kiel lernanto ankaŭ s-ino Wosik Schutijser, koredevena kaj nun loĝanta en Nederlando.

Posttagmeze, la NGGE-Prezidanto, Rob Moerbeek, prezentis frazojn kun eraroj, kiujn li aŭdis dum diversaj Esperanto-aranĝoj. La ĉeestantoj povis formuli la frazon en sia ĝusta formo kaj estis preparolitaj la gramatikeroj ligitaj al la eraro farita.

Atilio Orellana Rojas

## Velura sezono

27 sep – 6 okt en Jalta (Krimeo, Ukrainio) okazis la 13a Internacia festivalo *Velura sezono* kun 60 partoprenantoj el naŭ landoj.

La festivalo estas unu el kulturamasaj aranĝoj de la urbo, organizas ĝin jalta Esperanto-klubo *Tero* kune kun kultura fako de la urbestro. Ĝi celas propagandi Esperanton al urbanoj kaj ripozantoj, kiuj abundas en Jalta dum la ripoza sezono, kiun oni nomas “velura”. En la urbo pendis afiŝoj pri la bonfaraj koncertoj sur la urba placo kaj en la urba kulturcentro. La koncertoj pasas en diversaj naciaj lingvoj kaj Esperanto.

Ĉi-jare krom la grandaj koncertoj, ĉiuvespere ĉe lignofajro unufoje okazis koncertoj en Esperanto de Georgo Handzlik, P.Mojajev, M.Kočetkova, A.Ĥrustalov, M.Sabala. Ĉe la fajro kaj dum koncertoj sin prezentis famaj krimaj bardoj K.Frolov, V.Ŝiŝkin, P.Grebenjuk, K.Viĥlajev kaj unu el la plej bonaj ukrainiaj gitaristoj V.Osinskij.

Teatro *Kotelok* (Ĥarkov) prezentis muzikdraman teatraĵon *Oksigeno* de Ivan Vyropajev, kiun oni nomas “manifesto de junularo de la 21a jarcento”. La spektaklon oni prezentis en la rusa kun anoncoj en Esperanto.

La festivalanoj piedekskursis en Livadia palaco, eksa cara palaco en Massandra, Voroncova palaco en Alupka, kastelo *Hirunda nesto* k.a. kaj busekskursis tra Krimeo.

Jefim Zajdman

## Imposto por Esperanto

La itala Agentejo por la Enspezoj (la branĉo de la Ministerio pri financoj kiu prizorgas impostdeklarojn) sciigis la rezulton de la elektoj esprimitaj de impostodeklarantoj por la destiniĝo de 5 promiloj de la impostoj pagataj por la jaro 2005, favore al asocioj “de publika utileco, volontulado, klerigo, scienca esploro, de la komunumoj”.

Koncerne Esperantajn asociojn/movadojn, la rezulto estas:

Esperanto Radikala Asocio: 134.955,83 eŭroj (elektoj: 4.368)

Itala Esperanto-Federacio: 17.571,20 eŭroj (elektoj: 504)

Triesta E-Asocio: 1.666,49 eŭroj (elektoj: 58)

La enlistigo de CER-ES (centro esperantista Ekumena kaj Solidara de Rimini) estis malakceptita (pro manko de legitimiloj), kvankam ĝi ricevis 2.183,52 eŭrojn (109 elektoj).

Laŭ [Soc.culture.esperanto](http://Soc.culture.esperanto)

## Idealismo kaj la praktika agado

Bonvenon al Giorgio Bronzetti kaj al liaj ideoj. Mi legis lian artikolon *Nerezignebla renovigo* (*LOdE*, №154–155) kaj la reagojn de legantoj (*LOdE*, №156).

Mi ne vere havas multon por komenti pri la artikolo de Giorgio Bronzetti [krom tio, ke li uzas la neoficialan radikon “old-”, kaj pro tio li havas multajn problemojn en la tago de la lasta juĝo. Vidu: [http://www.bonalingvo.it/index.php/Ssv:\\_O](http://www.bonalingvo.it/index.php/Ssv:_O)]. Pri sia eŭropemo ĉiu respondecas mem.

Sed, pri iom pli seriozaj aferoj: la ideoj de Giorgio pri tio, ke oni devas iri al la normala homo kaj konvinki lin pri la praktikaj avantaĝoj de Esperanto, trovas min tute malfermita. Eventuale Giorgio iom subtaksas la malfacilaĵojn realigi tiujn ideojn, por kies realigo ĝis nun ne troviĝis unu (mi substrekas: unu) aktivulo preta labori senpage por aranĝi transsiberian vojaĝon kun Esperanto aŭ dumsomera instruado de Esperanto sur la plaĝoj de la mondo. Sed estas oportune, ke li subtaksas, ĉar tiel li entuziasme antaŭeniras kaj eble iu en la fino konvinkigos.

Pri la fakto, ke mi volas plibonigi la mondon per Esperanto, tio estas konata. Mi kredas, ke apud la praktika agado, pri kiu parolas Giorgio, la idealisma ankaŭ devas resti. Se generacioj de esperantistoj tenis la lingvon vivanta tra unu jarcento, tra militoj kaj aliaj teruraĵoj, tio certe ne ŝuldiĝis al la praktikaj avantaĝoj de Esperanto sed al la misiisma sinteno de la esperantistoj. Giorgio mem estas bona ekzemplo de tiu misiismo. Li senpage (alivorte page de li mem) laboras por Esperanto multe pli ol se oni pagus lin.

Aliflanke, la profitantoj de la praktikaj utilaĵoj de Esperanto, pri kiuj parolas Giorgio kaj aliaj, ne estas homoj, kiuj senpage laboras por alies praktika utilaĵo. La plej granda krizo en la evoluintaj landoj estas krizo de “vokiĝoj”. Homoj volas nek iĝi pastroj nek iĝi volontulaj aktivaj esperantistoj. Tion certe ne povas solvi la estraro de UEA.

Mi volas kapti la okazon por reaserti mian fidon je la nova estraro kaj je ĝia prezidanto. Mi kredas ke la kritikoj al li, kiujn mi legis, estas efektive senbazaj.

Cetere, se vi permesas, mi apartenas al tiu pensoskolo, kiu pensas, ke ne Hitler sola, sed la germanoj kaj amaso da eŭropanoj en aliaj landoj, murdis la judojn kaj faris aliajn malbonaĵojn. Alivorte estas malmulto, kion la estraro povas fari kaj multo, kiun devas fari ni mem.



“...ne Hitler sola, sed la germanoj kaj amaso da eŭropanoj en aliaj landoj, murdis la judojn kaj faris aliajn malbonaĵojn”.

**Renato Corsetti** (Italio)

## Esperantujo, insulo de ekvilibro

Kun interesiĝo mi legis la artikolon de Giorgio Bronzetti, kaj la aliajn pri tiu temo. Mi supozas ke ĉar la UEA havas novan prezidanton, estas la sezono pensi pri renovigo en la Esperanto-movado. Kaj eble oni emas kulpigi iom la antaŭan prezidanton ĉar, post lia deĵorperiodo, Esperanto ankoraŭ ŝajnas malpragmata strangaĵo al multaj homoj.

Mi konsentas kun Giorgio Bronzetti kaj Ivo Durwael ke “oni alcelu la normalan homon”. Nuntempe, kiam normalaj homoj vojaĝas pli kaj pli, la nekono de aliaj lingvoj sentiĝas pli kaj pli. La turisma komerco ebligas turistojn vojaĝi tra landoj kun minimuma konversado kun la loĝantaro. Unufoje mi vojaĝis aŭtobuse tra Italio kun grupo de usonaj turistoj. La hotelpersonaroj kaj la gvidistoj, ĉiuj tre gastigemaj, parolis angle. Ni vizitis multajn vidindaĵojn, kaj aŭdis klerajn informojn de la bone informitaj, angleparolantaj gvidistoj, sed post nelonge la aŭtobuso fariĝis speco de kokono el kiu mi malofte eliris.

Granda kontrasto al la vojaĝo, kiun mi faris antaŭ jaroj en Meksiko kaj Centra Ameriko, kie mi povis paroli kun ĉiuj, ekzemple la kamionisto en Nikaragvo, kiu klarigis ke la truoj kaj fajrodamaĝo ĉe lia kamiono okazis kiam li transportis provizaĵojn por la sandinistoj, kaj proksime eksplodis fosfora grenado. Tiam konversadon oni malofte havas kun turismogvidisto.

Do, pli bone ol Esperanton estus regi la tiean lingvon. Sed oni ne povas lerni ĉies lingvon. Por la normalaj homoj, kiuj ne povis loĝi longtempe en Britio aŭ Usono, la angla servas nur iomgrade kaj malprofunde.

Por atingi tiujn normalajn homojn, la artikoloj diras ke esperantistoj “normaliĝu”. Mi estas novulo, sed ŝajnas al mi ke Esperantujo ne inkluzivas pli da stranguloj ol aliaj grupoj. Fakte, komparita kun multaj movadoj, Esperantujo estas insulo de ekvilibro. Sed jes, esperantistoj konduku normale, amike, kaj honeste.

Honeste, esperantistoj agnosku ke la lingvo ne havas ekonomian aŭ politikan potencon, ne estas laŭmoda aŭ “sexy”. Esperanto ne estas misio aŭ ekskluziva klubo. Ĝi estas lingvo kiu povas solvi multajn komunikadproblemojn, sed ne ĉiujn. Studi Esperanton ne signifas ke oni ne devas studi aliajn lingvojn. Ĉiam estos bezono kaj volo studi naciajn lingvojn.


Amiko mia iam diris ke “per fremdlingvoj plej gravas konversadi”. La normalaj homoj volas konversadi. La plej grava aliro de Esperanto estas tio ke ĝi bone taŭgas por la konversado. La plej grava avantaĝo estas ĝia facileco. Neesperantistoj eble grumblos pro la laboro lerni eĉ unu fremdlingvon, memorante la licean frustracion, sed Esperanto estas ege pli facila, kaj tial pli pragmata. Oni povas interparoli kun fremdlingvanoj sen pasigi jarojn en la klasĉambro aŭ monatojn en tiu lando. Do, la venontan fojon ke vi trovas vin parolante anglan (aŭ alian lingvon) Boratmaniere\*, demandu al via kunparolanto: ĉu li/ŝi parolas Esperanton. Se ne, demandu kial ne. Neniu ĝin parolas? Mi ĝin parolas. Ne pragmata? Ĝi estus tre pragmata en la nuna situacio.

Eble unu tagon fama supermodelino anoncos ke ŝi parolas Esperanton kaj ĉeestos la venontan UK kun ĉiuj siaj paparacoj. Tio pliigus intereson pri Esperanto... eble. Ĝis tiam ni dependu de normalaj homoj.

**Scott Page** (Usono)

\* Per la vorto “Boratmaniere” mi aludas al la filmo *Borat*, kiu aperis antaŭ unu jaro. Ĝi estas komedio (laŭ kelkaj) kaj temas pri stranga raportisto, nomita Borat, el Kazaĥstano. Li estas vestita per malbelegaj, tute eksmodaj kompletoj, kaj vojaĝas tra Usono. Tie li ekkonas kaj uzas, la unuan fojon, klozeton, mikro-ondan fornelon, elektron kaj aliajn inventaĵojn, kiuj ŝajne ne haveblas en Kazaĥstano (aŭ en aliaj malriĉaj, ekzotikaj landoj). La celo estas satirigi kaj la senpripensan, provincisman, usonan, konsumeman socion kaj la adoron de malriĉa, ravita fremdlandano por ĉiuj facetoj, aparte la plej ridindaj, de la usona vivmaniero.

## Mia gravega kulpo!



Kia vangofrapo! Vangofrape batis sur mian vizaĝon la kovrilfoto de №10 de *La Ondo*! Ĉu, do, ankaŭ gejunuloj partoprenis la someran Ekumenan Kongreson en Pelplin, dum mi evitis kuntreni tien mian maljunecon pro timo pliigi la partoprenantaran maljunecon! Vangofrapo bedaŭriga kaj kulpiga!

Kiu scias, kia estas la ekumenismo de gejunuloj? Ĉu en sia animo la konfesiaj malsamecoj estas vidataj sen-

valoraj kaj senmotivaj, aŭ jam ili fine sentas, ke diverskonfesianoj povas reciproke estimi kaj ami sin kaj kunlabori, sendepende de sia konfesia kredo? Kristanoj ja povas ĉiam frate kuniĝi, puŝitaj de la komune ĉie konfesata kredo en la Triunuo kaj dieco de Jesuo. Ĉu en la animo de ekumeniĝantaj gejunuloj fine malaperis la memoro pri luktoj kaj malamikecoj, kaj oni komprenis ke eblas koni la aliulan konfesian kredon sen ĝin batali kaj misformi, eĉ ĝin simpati, sen rezigni la sian?

Ĉion tion mi esplortus ĉeeste. Mi perdis la okazon. Mia kulpo, mia gravega kulpo! Ĉu diligentaj ĉeestantoj spertis, ke eblas respondi la supran demandon?

**Armando Zecchin** (Italio)

## Peterburga panoramo

En Peterburgo almenaŭ kvar societoj uzas Esperanton.

La koruso *Blua Ponto* en sia repertuaro enhavas kantojn en Esperanto. Ĉiujare la koruso prezentas po 3-4 koncertojn en Esperanto.

Danke al Sankt-Peterburga Interlingvistika Rondo SPIRO (gvidas Slavik Ivanov) estas prespretigita Granda Esperanta-Rusa Vortaro de Boris Kondratjev. SPIRO aktivas ankaŭ rete: la novaĵforumon, gvidatan de Ivanov, legas ĉ. 5000 abonantoj; la retkurson (gvidas Aleksandr Osokin) vizitas 1356 personoj. Oksana Burkina instruas Esperanton en la Sankt-Peterburga Universitato. Laŭ iniciato de SPIRO en Puŝkin okazis Lingva festivalo (vd. *LOdE*, №150).

La blindula klubo *Amikaro* (gvidas Anna Fominiĥ) vegetas pro perdo de subvencio de la kulturministerio. Sed en ĝia klubejo okazigas kunvenojn la tuturba societo *Espero* (gvidas Svetlana Ejst) kun interesaj prelegoj. (Oni scias nenion pri la samnoma *Espero*, gvidata de Anna Butkeviĉ.)

Peterburganoj partoprenas en *Liro* kaj en aliaj konkursoj, kunlaboras en *La Ondo de Esperanto* kaj en aliaj gazetoj, vizitas esperantistajn renkontiĝojn en- kaj eksterlande, akceptas alilandajn esperantistojn. Ĉi-jare televido dufoje prezentis filmetojn pri esperantista agado.

Dum tuturba konferenco de peterburgaj esperantistoj estis diskutita ideo pri okazigo de Ruslanda Esperanto-Kongreso en 2010 en Sankt-Peterburgo por celebri 100-jaran datrevenon de la unua Ruslanda Kongreso okazinta en la urbo en 1910. La kongresanoj povos loĝi, interalie, en hotelo en Boljŝoj prospekt, ĉe kies malfermo *Espero* kunlaboris, ja esperantistoj tie ĝuas 15-procentan rabaton.

Kompilis **Anatolo Sidorov** (Peterburgo, Ruslando)

## Ĉu subskribi ĉiun foton?

Mi estis leganta la lastan numeron de *LOdE*, kaj konkrete la paĝojn 12 kaj 13. Subite, mi sentis la neceson skribi pri jena afero: oni ne povas identigi la tie aperantajn fotojn.

Kiu estas la sinjoro aperanta en foto sur paĝo 12: Bronzetti aŭ la subskribanto de la artikolo Ivo Durwael? En foto sur paĝo 13, kiu aperas: Bronzetti aŭ la aŭtoro de la artikolo s-ro Malovec?

Miaopinie oni devus sube de la foto aŭ ie ajn en la paĝo meti la nomon de la koncerna homo tie aperanta.

**Dario Rodriguez** (Hispanio)

## Responde al Gian Carlo Fighiera

Mi legis vian tekston *Heroldo pirate eldonata*. Vi skribas pri La Civito (sen mencii tiun nomon), ke ĝi estas sekto, verŝajne nur pro ĝia malgrandeco. Sed ĉu movado estas sekto nur pro ĝia malgrandeco? Por multe da neesperantistoj ekzistas mito, ke la tuta esperantistaro ja estas sekto....

Mi pensas, ke la kritikemo de la Civito (ofte akra) dependas de bezono reliefigi la novstilan organizon (la Civito) kontraste al pli tradicimodela (UEA).

Laŭ mi, la Civito estas tre grava aganto en la Esperantomondo, ĉar ĝi elprovas tutnovan agaron por Esperanto.

Mi ne konas la ekzaktajn cirkonstancojn pri kiam *Heroldo* fariĝis posedaĵo de la Civito, sed mi ne rekonis vian prikskribon pri figazeto de la aktuala *Heroldo*. Mi tre ŝatas ĝin.

**Jarl Hammarberg** (Svedio)

## Premio Zamenhof, jaro 2007

(**Informitale**) Itala Esperanto-Federacio ĉiujare donas la Premion Zamenhof al konataj rolantoj de la socia vivo en Italujo, kiuj per sia agado kontribuis al la realigado de la idealoj de la Esperanto-movado. La dona ceremonio okazos ankaŭ ĉi-jare en Ancona 7 dec 2007 en la loka *Teatro Sperimentale*.

La premiojn ricevas ĉi-jare: **Gianfranco D'anna**, vic-direktoro de la radia kanalo 1a, pro la dissendoj *Forgesita Planedo*; **Manuela Dviri**, ital-devena ĵurnalistino en Israelo pro la iniciatoj pri kunlaborado inter israelaj kaj palestinaj kuracistoj en malsanulejo en Jerusalemo; **Stefania Casini**, aktorino kaj reĝisorino pro dokumentaj filmoj kun granda socia engaĝiĝo.

**Renato Corsetti** (Italio)

## Koreaj studentoj volas skajpi

En la dua semestro de koreaj universitatoj, 334 gestudentoj aliĝis al la kursoj de Esperanto, kiuj komenciĝis de aprilo en la universitatoj Korea fremdlingva (Seulo kaj Yon-gin), Dankook (Seulo kaj Chonan) kaj Wonkwang (Iksan).

La aliĝintaj studentoj lernos Esperanton dum 16 semajnoj po du horoj semajne kaj ili gajnos du notojn oficiale.

La studentoj de tempo al tempo provos paroli Esperante kun nekoreaj esperantistoj per *Skajpo*, reta komunikilo dum lecionoj. Via bonvola reago donos grandan motivon al la studentoj. "leejungkee" estas Skajpo-adreso de docento Lee Jung-kee, kiu instruas en tri universitatoj. (Docento Ma Young-tae gvidas en Korea fremdlingva universitato en la kampuso Yongin.)

**Lee Jung-kee** (Koreio)

La Kenigsberga universitato Albertina estis fondita en 1544 sur la ondo de la reformacio. La reformacio, celanta transformadon de la okcidenta kristanismo kaj demokratiigon de la ekleziaj institucioj, funde influis la socian vivon de la okcident-eŭropaj popoloj, la evoluon de kulturo kaj edukado.

La historia sorto kaj la geografia situo inter la balta-slava oriento kaj la germana okcidento donis al Albertina apartan rolon ne nur en scienco, sed ankaŭ en teologio kaj politiko.

### Kazo Osiander

La unuaj jardekoj de Albertina estis malfacilaj pro senkompataj religiaj-dogmaj konfliktoj, kiuj daŭris dum multaj jaroj. La juna luterana doktrino devis kontraŭstari la romkatolikismon, firmigi internajn principojn, difini rilatojn kun aliaj protestantaj movadoj. Tiujn procezojn akompanis akraj teologiaj disputoj, kiuj en Kenigsbergo ofte transiris al personaj konfliktoj inter teologoj. La idea senkompromisemo malfortigis la intelektan potencialon de la Kenigsberga universitato, subfosis ĝian aŭtoritaton, fortormigis profesorojn kaj studentojn.

La plej (mis)fama iĝis la kazo Osiander. Ĝia centra figuro estis nurenberga predikanto Andreas Osiander (1498–1552), sub kies influo Albreĥto transiris al reformismo. En 1549 Osiander iĝis profesoro de la Kenigsberga universitato kaj estro de la teologia katedro (li forlasis Nurenbergon pro dogmaj diverĝoj kun la rigoraj luteranoj).

La opinio de Osiander pri kelkaj dogmoj de luteranismo diverĝis de la luterana doktrino kaj vekis kritikon de la lokaj teologoj. Osiander kun la tuta ardo de sia temperamento defendis sian propran vidpunkton. La disputo forlasis la akademiajn murojn, skismigante ne nur ekleziulojn kaj universitanojn, sed ankaŭ multajn urbanojn. Albreĥto subtenis la partion de Osiander, kaj la konflikto akiris politikan karakteron. Parto de profesoroj kaj studentoj forlasis la universitaton.

La senkompataj disputantoj malbenis siajn kontraŭulojn de katedroj, en urĝe presitaj folioj kaj en teologiaj verkoj. Post la morto de Osiander la konflikto daŭris pli ol dek jarojn. La finon metis speciala komisiono de la pollanda reĝo, kiun iniciatis malkontentaj nobeloj. Laŭ ĝia verdikto en 1566 estis ekzekutitaj tri konsilistoj de Albreĥto gvidantaj la Osianderan partion.

## Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (9)

### de Halina Gorecka

#### Skalić, Skalich, Scaliger...

La lastajn vivojarojn de Albreĥto malserenigis apero de Paul Skalich (= Stanislav Pavao Skalić, Paul Scaliger, Paulus Scalichius, 1535–1575) — teologo laŭ la klero, aventuristo laŭ la inklino.

Skalich estis kroato. Li studis en Vieno kaj Bolonjo. En la aĝo de 18 jaroj li iĝis doktoro de teologio, post du jaroj li iĝis kortega predikisto de la reĝo Ferdinando I. Kulpigita pri herezo Skalich trovis azilon en Wittenberg, el kie li venis al la kortego de Albreĥto.

La dudeksesjara intrigulo sukcesis dum mallonga tempo ĉarmi la maljunan princon per rafinitaj manieroj, vigla spirito kaj, precipe, per okultaj seancoj. Skalich iĝis potenca favorato, li enoficigis kaj eksigis konsilistojn de la princo. Li ricevis donace teron kaj domojn.

Dum la teologia konflikto Skalich prudente aliĝis al la Osiandera partio. Nobeloj kaj urbanoj estis malkontentaj pro lia tute arbitra regado. Ankaŭ en Albertina li havis malamikojn. Sen havi formalan akademian oficon, li, kun aprobo de la princo, lekciiis pri filozofio, atakante la regantan Aristotelan instruon. Studentoj ŝatis la lekciojn de Skalich, sed profesorojn ili incitis. Antaŭ la alveno de la pollanda komisiono Skalich subite malaperis. La tuta malkontento pri liaj intrigoj trafis la princon.

Psike rompita pro la ekzekuto de siaj partianoj, ŝarĝita per pezo de la

travivitaj jaroj, la maljuna princo post 1566 praktike forlasis la aferojn. Albreĥto mortis 20 mar 1568 en la kastelo Tapiiau; samtempe en Neuhausen mortis lia dua edzino, la 36-jara Anna Maria.

Tiel finiĝis la longa kaj maltrankvila vojo de la lasta, tridek-sepa grandmajstro de la Teŭtona Ordeno, la unua princo de Pruslando, la fondinto de la Kenigsberga universitato — Albreĥto Brandenburga.

#### La Longa Kolbaso

La 17an jarcenton Kenigsbergo renkontis per brua festo de la Longa Kolbaso. 1 jan 1601 de la viandista korto startis nekutima procesio kun standardoj kaj muziko. 103 viandistoj akompanataj de gaja amaso, portis surŝultre pli ol 400-metran kolbasegon, kiun ili produktis. Apud la kastelo preskaŭ 60-metra peco estis donacita al la princa kortego kiel novjara donaco, poste siajn pecojn ricevis urbestroj de la tri Kenigsbergaj urboj: Altstadt, Löbenicht kaj Kneiphof. La “restaĵoj” oni portis al la panbakista korto, kie en gaja festeno partoprenis viandistoj kaj panbakistoj.

Post kvin tagoj, je Epifanio, panbakistoj aranĝis por la urbanoj feston de la Granda Kringo.

La tradicio pluvivas. Meze de oktobro 2007 kaliningradaj viandistoj pretegis sian Longan Kolbason. Sed tio estas tute alia historia paĝo.

(Daŭrigota)



Kolbasfesto en la malnova Kneiphof



# Diagnozo de morto

*de Ambrose Bierce*

— Mi ne estas tiel superstiĉa kiel iuj el vi kuracistoj — scienculoj, kiel vi volas esti nomataj, — diris Hawver, respondante akuzon, kiu ne estis farita. — Iuj el vi — nur kelkaj, mi konfesas — kredas je senmorteco de la animo, kaj je aperaĵoj, kiujn vi ne honestas nomi fantomoj. Mi ne transpaŝas la konvinkon, ke vivantojn oni kelkfoje vidas tie, kie ili ne estas, sed ja estis — kie ili tiel longe vivis, eble tiel intense, ke ili postlasis impreson de si sur ĉiujn aferojn ĉirkaŭe. Mi scias ja, ke la medio povas esti tiel influita de onia personeco, ke ĝi redonas, post longa tempo, bildon de oni al la okuloj de alia homo. Sendube la impresanta personeco devas esti la ĝusta speco de personeco, same kiel la perceptantaj okuloj devas esti la ĝusta speco de okuloj — miaj, ekzemple.

— Jes, la ĝusta speco de okuloj, transdonantaj sentojn al la malĝusta speco de cerbo, — diris d-ro Frayley, kun rideto.

— Dankon; oni ŝatas vidi plenumita sian atendon; mi supozis, ke vi havos la ĝentilecon doni ĝuste tian respondon.

— Pardonu min. Sed vi diris, ke vi scias. Tio estas diri multon, ĉu ne? Eble vi ne avaros la penon diri, kiel vi eksciis.

— Vi nomos ĝin halucino, — diris Hawver, — sed tio ne gravas.

Kaj li rakontis la historion.

« La pasintan someron mi iris pasigi la varman veteron, kiel vi scias, en la urbo Meridiano. La parenco, en kies domo mi intencis gastigi, estis malsana, do mi serĉis alian loĝejon. Post iom da malfacilaĵoj mi sukcesis lui vakan

domon, kiun antaŭe okupis ekstravaganca kuracisto kun la nomo Mannering, kiu foriris antaŭ jaroj — neniu sciis, kien, eĉ ne lia agento. Li mem konstruis la domon kaj vivis en ĝi kun maljuna servisto dum ĉirkaŭ dek jaroj. Lian praktikadon, neniam tre ampleksan, li post kelkaj jaroj plene rezignis. Ne nur tiel, sed li ankaŭ retiriĝis preskaŭ tute el la socia vivo kaj iĝis homevitulo. Min informis la vilaĝa kuracisto, preskaŭ la sola persono, kun kiu li havis ian rilaton, ke post sia retiriĝo li dediĉis sin al unu sola studvojo, kies rezulton li elmetis en libro, kiu ne rekomendis sin al la aprobo de liaj profesiaj kolegoj, kiuj fakte ne konsideris lin mense tute sana. Mi ne vidis la libron kaj ne povas nun memori ĝian titolon, sed oni informis min, ke ĝi elmetis iom konsternan teorion. Li argumentis, ke eblas ĉe multaj homoj en bona sano antaŭdiri ilian morton precize, plurajn monatojn antaŭ la okazo. La limo, mi pensas, estis dek ok monatoj. Estis lokaj rakontoj, kiel li aplikis sian povon de prognozo, aŭ eble vi nomus ĝin diagnozo, kaj oni diris, ke en ĉiu okazo la homo, kies amikojn li avertis, mortis subite en la antaŭdirita tempo, kaj pro nenia rekonobla kaŭzo. Tamen, tio neniel rilatas al la afero, kiun mi rakontas; mi pensis nur, ke ĝi eble amuzos kuraciston.

« La domo estis meblita, ĝuste kiel li loĝis en ĝi. Ĝi estis iom melankolia loĝejo por iu, kiu estas nek homevitulo nek studento, kaj mi pensas, ke ĝi transdonis al mi iom el sia karaktero — eble iom el la karaktero de sia antaŭa loĝanto; ĉar ĉiam mi sentis en ĝi certan morozon, kiu ne apartenas al mia natura temperamento kaj ankaŭ ne ŝuldiĝas al soleco, mi pensas. Mi havis nenium serviston, kiu dormis en la domo, sed mi ĉiam ŝatis, kiel vi scias, la propran socion, kiel iu, kiu multe emas legi, kvankam mi malmulte emas studi. Kio ajn estis la kaŭzo, la efiko estis deprimo kaj sento pri okazonta malbono; tio speciale validis en la kabineto de d-ro

Mannering, kvankam tiu ĉambro estis la plej luma kaj malplej sufoka en la domo. Vivgranda oleoportreto de la doktoro pendis en tiu ĉambro, kaj ŝajnis plene superregi ĝin. En tiu bildo estis nenio malkutima; la viro estis evidente iom belaspekta, aĝanta ĉirkaŭ kvindek jarojn, kun fergrizaj haroj, glatrizita vizaĝo kaj malhelaj, seriozaj okuloj. Io en la bildo ĉiam tiris kaj tenis mian atenton. La aspekto de la viro konatiĝis por mi, kaj iom “hantis” min.

« Unu vesperon mi trapasis tiun ĉambron survoje al mia dormoĉambro, kun lampo — mankas gaso en Meridiano. Mi haltis, kiel kutime, antaŭ la portreto, kiu ŝajnis en la lampolumo havi novan esprimon, malfacile nomeblan, sed forte maltrankviligan. Ĝi interesis, sed ne perturbis min. Mi movis la lampon de unu flanko al alia, observante la efikon de la ŝanĝita lumo. Tiel okupite, mi sentis impulson turniĝi. Kiam mi tion faris, mi vidis viron, kiu moviĝis tra la ĉambro rekte al mi! Kiam li sufiĉe proksimiĝis, ke la lampo lumigis lian vizaĝon, mi tuj konstatis, ke li estis d-ro Mannering mem; estis, kvazaŭ la portreto marŝus!

« — Mi pardonpetas, — mi diris, iom malvarme. — Tamen, se vi frapis, mi ne aŭdis.

« Li preterpasis min, je longo de brako, levis la dekstran montrofingron, kvazaŭ averte, kaj senvorte eliris el la ĉambro, kvankam mi vidis lian eliron same malmulte, kiel mi vidis lian eniron.

« Kompreneble, mi ne devas diri al vi, ke ĉi tio estis io, kion vi nomus halucino, kaj mi nomas aperaĵo. Tiu ĉambro havis nur du pordojn, el kiuj unu estis ŝlosita; la alia kondukis al dormoĉambro, el kiu ne estis eliro. Kiel mi min sentis, konstatinte tion, ne estas grava parto de la incidento.

« Sendube ĉi tio ŝajnas al vi tre kutima ‘fantomrakonto’ — unu konstruita sur la regulaj linioj desegnitaj de la malnovaj mastroj de la ĝenro. Se



tiel estus, mi ne rakontus ĝin, eĉ se ĝi estus vera. La viro ne estis mortinta; mi renkontis lin hodiaŭ en la Unia Strato. Li preterpasis min en homamaso.»

Hawver finis sian rakonton, kaj ambaŭ viroj silentis. D-ro Frayley malatente tamburis la tablon per la fingroj.

— Ĉu li diris ion hodiaŭ? — li demandis. — Ion, el kio vi deduktis, ke li ne estis mortinta?

Hawver gapis kaj ne respondis.

— Eble, — daŭrigis Frayley, — li faris signon, geston — levante fingron, kvazaŭ averte. Ĝi estis artifiko ĉe li — kutimo, kiam li diris ion seriozan — anoncanta la rezulton de diagnozo, ekzemple.

— Jes, li faris tion — ĝuste kiel faris lia aperaĵo. Sed, je Dio! Ĉu vi iam konis lin?

Hawver ŝajnis nervoziĝi.

— Mi konis lin. Mi legis lian libron, kiel iam faros ĉiu kuracisto. Ĝi estas unu el la plej frapaj kaj gravaj kontribuoj al medicina scienco de ĉi tiu jarcento. Jes, mi konis lin; mi flegis lin en malsano antaŭ tri jaroj. Li mortis.

Hawver saltis de sia seĝo, videble perturbite. Li paŝegis tien kaj reen tra la ĉambro; poste li aliris sian amikon kaj diris per voĉo ne tute firma:

— Doktoro, ĉu vi havas ion por diri al mi — kiel kuracisto?

— Ne, Hawver; vi estas la plej sana viro, kiun mi iam konis. Kiel amiko mi konsilas al vi iri al via ĉambro. Vi ludas la violonon kiel anĝelo. Ludu ĝin; ludu ion leĝeran kaj viglan. Forĵetu de via menso ĉi tiun malbenitan aferacon.

La sekvan tagon oni trovis Hawver mortinta en lia ĉambro, kun la violono ĉe la kolo, la arĉo sur la kordoj, kaj lia muzika kajero malfermita antaŭ li ĉe la funebra marŝo de Ŝopeno.

Tradukis **Edmund Grimley Evans**

Pro ĉi tiu traduko Edmund Grimley Evans iĝis laŭreato de [Liro-2006](#) en la branĉo *Traduka prozo*.



# La amikaro de Doris



Ĉiujare oni debatas pri la Nobela Premio por literaturo: ĉu la ricevanto vere meritigas ĝin. Foje la plej prestiĝa literatura premio en la mondo ŝajnas esti la plej senvalora, sed de tempo al tempo la komitato trovas meritoplenan kandidaton. Certe ni rajtas demandi, kial la ĉi-jara laŭreatino, la angla Doris Lessing, ricevas ĝin nur nun, 45 jarojn post la apero de ŝia plej grava verko. Sed la verkaro de Lessing estas abunda, ŝia influo nediskutebla, ŝiaj legantoj loĝas en la tuta mondo — do foje eĉ plej grumblema kritikanto devus agnoski, ke la Nobela komitato faris taŭgan decidon. Por la verkistino mem ne gravas: *Nu, vidu, mi jam havas ĉiun premion de Eŭropo, do nun ankaŭ ĝin*. Bela sinteno.

La vivo de Lessing komenciĝis antaŭ 88 jaroj en Kermanŝah, nun en Irano. La patro servis por la kolonia administracio, la patrino estis flegistino. Lessing estis ankoraŭ knabineto, kiam la familio translokiĝis al Rodezio (nun Zimbabvo). La vivo tie estis malfacila, do la revo pri idilia terkultivado inter sovaĝuloj ne realiĝis. Ĉiam Lessing revenas literature al la “nigra kontinento”. Dum multaj jaroj, kiam ŝi loĝis en Anglio, Zimbabvo kaj Suda Afriko tamen estis fizike neatingeblaj, ĉar la reĝimoj tie deklaris ŝin nedezirata individuo: tro akre Lessing malkaŝis la abomenindaĵojn en tiuj landoj.

En 1949 Lessing migris al Anglio. En 1950 ŝi priskribis afrikan tragedion en sia unua romano *La herbo estas kantanta*. Lessing ĉiam havis ribeleman spiriton. Fine de la dua mondmilito ŝi edziniĝis kun germana komunisto. Ĝis 1956 (Ĥruŝĉov, Hungario) ŝi estis membro de la komunista partio, sed neniam ŝi estis ortodoksa kredanto de tiu doktrino. *Nu, probable estis pli amuze esti komunisto en Londono ol en Moskvo*. Kontraste al aliaj maldekstremaj intelektuloj ŝi neniam forgesis la viktimojn de la komunistaj diktaturoj. *Stalin povintus instrui Hitleron*.

Lessing konsideras la realan vivon ĥaoso: socie, kulture, politike la homo spertas splitiĝon. Ni povas aŭ freneziĝi aŭ rekonstrui ion novan el la stumperoj — tio estas tre ĝenerale la temo de *La ora notlibro*. Ĉiuj konsentas, ke tiu estas la plej grava libro de Lessing, samtempe ĝi fariĝis la “Biblio de Feministoj”. Tamen Lessing prave atentigas, ke la temo estas pli ampleksa ol nur inista. Sed feministoj ofte ne ŝatas kritikon: *Inistoj ne laboras por [egalaj ŝancoj, egala salajro por sama laboro]. Tio estas dura laboro kaj signifas skribi al gazetoj, krei komitatojn, eniri parlamenton. Oni ne ŝanĝas aferojn kunsidante kaj kriante al viroj. Tio estas nura sindorloto*.

La centra temo, la fenditeco de la individuo, estas rekonebla ankaŭ en *Memo-roj de Survivintino* de 1974. Lessing provis verki scienc-fikciaĵojn por apliki tiun trukon: se ni rigardus nian mondon de ekstere, ni povus pli amplekse karakterizi ĝian putrecon. *Vidate de ekstere, komplete frenezaj estuloj loĝas sur tiu planedo. [...] Jen vulgara kaj nekontentiga planedo, plena de brutaj bestoj, kies nura celo estas trovi pretekston por kiel plej eble rapide murdi unu la alian*. (Sed la SF-ĝenro ne havas altan reputacion ĉe literaturaj moŝtuloj. Maliculoj supozis, ke pro tiu ekskurso al laŭdire pli ebenaj teritorioj ŝi ne ricevis la Nobel-premion pli frue.) Ankaŭ iuj ŝiaj legantoj ne tre ŝatis tion, kaj ili ĝojis, kiam Lessing revenis al pli akceptita verkmaniero, la romano pri socia indigno, kotopo.

Ankoraŭ freŝa en la menso, Lessing tamen sentas la limojn de la aĝo: nun ŝi povas skribi nur tri horojn tage. Verkante ŝi vivas, pritrakti vortojn estas ŝia ŝatokupo. Lessing observas kun zorgo la nunan mondon. Ŝi sentas optimismon por la individuo, sed pesimismon por nia socio. *Mi kredas, ke venos plia mondmilito. Mi kredas tion, ĉar ni uzas enormajn masojn da mono por prepari la militon, kaj do ĝi venos. Antaŭ la dua mondmilito estis dise voĉoj kiuj diris: “Ne, ne eblas, ke ni havu ankoraŭ unu militon. Tio estus tro terura”. Sed fakte ni preparis ĝin, kaj tiam ĝi okazis. Kaj mi kredas, ke la tria mondmilito okazos. Ni ĉiuj scias, kio probable okazos dum la sekvonta milito; ni ne bezonas kristalan bovlon por antaŭvidi tion, ĉu?*

Wolfgang Kirschstein

## Neimpresinta libro

**Karpunina, Lena. *Neokazinta amo / Antaŭpar. Sten Johansson. — Antverpeno: FEL, 2007. — 149 pĝ. — (Serio Stafeto; №31).***

*Neokazinta amo* estas la dua novel-kolekto de Lena Karpunina, rusino naskiĝinta en Taĝikio kaj nun vivanta en Germanio. Ŝia unua novelaro *La bato*, eldonita en 2000 kaj reeldonita en 2006, rikoltis favorajn menciojn. La stilo kaj ŝatataj temoj en la dua kolekto restis tute samaj.

Ses el la noveloj de la nova libro estis premiitaj aŭ honore menciitaj en Belartaj Konkursoj de UEA.

Sten Johansson en la antaŭparolo prave skribas, ke Lena Karpunina, samkiel aliaj aŭtoroj de la ĉefa fluo de la moderna novelarto, “prezentas homojn, agojn kaj situaciojn kvazaŭ atestante, sen juĝi pri ili”. Kaj ke specife ŝi prezentas eĉ strangajn kaj fiajn homojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin.

Ĉio estas verkita en mi-formo, la rakonto fluas vigle. Iam tiu “mi” estas (preskaŭ) la aŭtorino mem (en *Neokazinta amo* kaj *La demando de emancipiĝo* rolas esperantistoj), iam tute ne similas ŝin — kelkajn rakontojn prezentas viro-malliberulo de la 1940-aj jaroj. Forestas truda moralo, kiu ofte ĝenas eĉ aliaj novelistoj kiel Rosbach aŭ de Seabra.

Iuj rakontoj tre versimilas kaj probable transdonas tute realajn okazojn, aliaj — apenaŭ (eble la aŭtorino rera-kontas ion aŭditan de siaj konatoj). Precipe malversimilaj aspektas la noveloj pri vivo de malliberuloj kaj ties fuĝo-provoj. *La linko, Pro savo de homo, Ili estis sesope* kaj *Mirt* tro similas inter si, eĉ iuj frazoj ripetigās — do apenaŭ indus verki kvar apartajn novelojn...

Multo estas sufiĉe interesa. Tamen ĝenerale la novelaro impresas tro sentimentala, mi dirus eĉ — speciale “dezajnita” por elvoki larmojn de sentemaj, troemociaj legant(in)oj. Aliajn specojn de legantoj la novelaro, plej verŝajne, ne impresos. Tuj sentebas, ke tion verkis virino. Evidente, ankaŭ legos tiajn novelojn plejparte aŭ nure virinoj. Nu — ili ja konsistigas du trionojn de la Esperanto-komunumo,

almenaŭ en Ruslando, kaj certe ankaŭ ili devas havi sian literaturon; en la vivanta riĉa lingvo ekzistas ĉiuj specoj de literaturo...

Rimarkeblas kelkaj faktaj eraroj/elpensaĵoj. En *Trovi kaj perdi* — temas pri Moskvo — «ili loĝis en la distrikto “Arĝenta pinarbaro” sur la strato Siringa Bulvardo». Sed reale tiuj strato kaj distrikto situas en tute diversaj urbo-partoj, kaj en tiu distrikto estas nur parko, plaĝoj kaj nenia loĝdomo — kaj la priskribo de tiu loko estas tute fantazia. Plie, en Moskvo ne estas metrostacio “Ĉertanovo”, kaj la stacio “Ĉertanovskaja” neniam estis la fina. Eble tio estas bagatelo kaj tute ne rimarkeblas por aliurbanoj — sed tio lezas la fidon al la aŭtorino. Alia miso estas en *La Siberia parenkaro* — la protagonistino mencias, ke “kiam la aviadilo <...> surteriĝis en Sverdlovsk, jam malheliĝis. Estis duhora tempodiferenco antaŭen, ĉar ni flugis orienten.” (pĝ. 61), sed ili ja flugis el Duŝanbe, do norden, kaj la reala tempodiferenco estas unu horo malantaŭen; sur pĝ. 81 ŝi mem diras: “laŭvice ni renkontis la taĝikan Novan Jaron, poste la lokan”... Eble, preferindus uzi eĉ pure fantaziajn geografiajn nomojn — tre bele sonas siberia urbo Ursujsk (pĝ. 49).

Plurfoje estas citataj kantoj. En *La Siberia parenkaro* sur pĝ. 75 laŭ kruda proza traduko tuj rekoneblas *Холода* de Vladimir Visockij. Oni povas nur bedaŭri, ke la protagonistinon impresis ĝuste tiu kanto, sed ne iu alia simila — tiakaze eblus uzi brilan tradukon far Nikolai Lozgaĉev... Alia kanto de Visockij, kiun mi tamen ne sukcesis rekoni (pĝ. 117) estas tradukita ritme, kvankam subnivele. La rusan popolkanton pri frosto (pĝ. 85–86) kaj same ciganan kanton (pĝ. 132) eblus tute facile traduki kun necesa ritmo (la rimoj en la originalo malmultas kaj trivias).

Klasikstila fundamenta lingvaĵo, sen iaj “eksperimentoj”, bone portas la enhavon. Tamen, rimarkeblas kelkaj ĝenaj rusismoj: “gvidante” (pasigante) sian vivon (pĝ. 70), okupiĝis pri sia(j) haro(j) (pĝ. 74), “malliberulaj tendaroj” (pĝ. 76), kaj plej okulfrapa — “ludi sur gitaro” (pĝ. 136–140). La familinomo Visockij estas diverse transskribita sur pĝ. 75–76 kaj 117.

Komposteraroj preskaŭ ne estas, krom unu amuza: “oni pagas por ĝi cent dolorajn pli” (pĝ. 92). Ial konstante perdiĝas supersignoj de “j” en propraj nomoj: “Gjegoj” anst. Gjegoj

(pĝ. 11–22), “Nijnij” anst. Nijnij (pĝ. 61–62), “Serjoja” (pĝ. 72). Ne enordas la piednotoj: jen la noto por pĝ. 12 situas sur pĝ. 11, kaj por pĝ. 137 — sur pĝ. 138, jen tute mankas notoj sur pĝ. 23 kaj 90, kaj certe ne necesis ripeti tute saman tekston sur pĝ. 131 kaj 133, resp. pĝ. 140 kaj 144.

Fine de la libro troviĝas deko da tute malplenaj paĝoj...

**Valentin Melnikov**

## Surtabla libro por ĉiu

**Korĵenkov, Aleksander. *Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 16 pĝ. — (Serio Sed ne el katedralo; №3).***

La recenzata verko prezentas bildon de la gazetara mondo ekde la apero de *La Esperantisto* en 1889 ĝis la nuntempo. Estas interesa pionira periodo el la Esperanto-gazetara vivo kun nombroj da abonantoj en diversaj landoj.

En la dua ĉapitro estas prezentita klasifiko laŭ pluraj kriterioj. La gazetoj estas i.a. internaciaj, movadaj, sendependaj. Aldonas la bildon sekva ĉapitro pri *Ĝeneralaj magazinoj*.

Ceteraj ĉapitroj orientas la legantojn pri landaj kaj kulturaj Esperanto-gazetoj. La aŭtoro mencias pri vakaj revuoj, ĉar ne ekzistas sportaj, muzikaj, erotikaj, modaj Esperanto-periodaĵoj. Mi aldonus, ke bezonatas revuo pri fiŝkaptado kaj ties metodoj. Mi aŭguras sukcesan vivon al la revuo, ĉar la fiŝkaptistoj loĝas en ĉiuj teranguloj.

Kaptas atenton retrorigardo al Esperantaj gazetoj en socialismaj landoj kaj evoluo post forfalo de la socialismo mem. La ĉapitro donas precizajn nombrojn da abonantoj kaj eldonkvantojn nuntempe.


Fine de la verko estas konsiloj de la sperta ĵurnalista ĉu por legantoj, ĉu por dezirantoj instali Esperanto-periodaĵo(j)n.

Jen surtabla libro por ĉiu konscia esperantisto, ĉar sen la Esperanto-gazetaro oni ne povus vivi.

**Anatolo Sidorov**



**Ne forgesu reaboni!**



## Bona muziko, bona plenumo

Osmakowicz, Anna. *Kristabia Festo*. — [s.l.] LG-Mix, 2006.

Kristnasko en Pollando estas la plej ŝatata popola festo. Ĉiuj poloj tiam ŝatas kanti kaj aŭskulti “koledojn”, Esperante nomatajn “kristnaskaj kantoj” aŭ “pastoraloj”. Tial ne mirindas, ke pola kantistino Anna Osmakowicz registris jam la duan diskon kun tiu-specaj kantoj (la unua disko, *En kristnaska hor’*, aperis en 2005).

La maniero de la kanto-prezento en la dua disko de Anna Osmakowicz similas tiun en la unua: same bela malalta voĉo de la kantistino kunas kun elektromuzika akompano aranĝita de Leszek Gryczka, sed en kelkaj kantoj kun Anna Osmakowicz kunkantas la dua (vira) voĉo (*Dormu Jesueto, La kristnaska tempo*) aŭ ensemblo (*La betlehema lumo*).

La Esperantan tradukon de la kantoj kaj de la komentario farita de Anna Osmakowicz produktis Irena Łowińska. Ne havante la originalan tekston de la kantoj, mi nenion povas diri pri la koincido de la polaj kaj Esperantaj kantotekstoj, sed la komentara traduko montras la krea manieron de la teksta traktado. La tradukistino eĉ aldonis al la teksto kelkajn frazojn por plia ĝustigo de la aŭtoraj pensoj.

La kantoj, same kiel en la antaŭa disko, estas bele prezentitaj dank’ al grafika prilaboro de Adam Bolesta kaj preso de *Vegart Sp. z o.o.* La kovrilpaĝoj en blanka-blua koloroj kreas la kristnaskan vintran humoron por la aŭskultanto. Sur la unua kovrilpaĝo

estas prezentita la foto de la kantistino mem sur fono de la neĝkovrita abio (fotis Czesław Czaplinski).

El la 18 kantoj de la disko 12 havas indikitajn aŭtorojn (aliaj havas nur rimarkon, en kiu jarcento aperis la melodio). Plejparton de la tekstoj verkis A. Warecka, po unu kanto havas vortkreatoj St. Rzętkowski kaj J.A.Gwoździowski. Inter la muzikaŭtoroj estas J. Wierzbica, T. Woźniakowski, A. Seroczyński, Z. Noskowski, A. Prejzner, R. Szeremeta.

Preskaŭ ĉiuj kantoj havas popolan karakteron sendepende de la aŭtoreco. La belaj, trankvilaj, harmoniaj melodioj ne povas lasi indiferenta iun ajn aŭskultanton.

Denove, same kiel en la antaŭa disko, la teksta suplemento enhavas ankaŭ muziknotojn de ĉiu prezentita kanto.

Ĉu tio estas bona? Sendube, jes. Sed la kvalito de la notaro povus esti multe pli bona, se oni pripensus la celon de la notpublikigo kaj ties utilon por la uzantoj. Krom tio necesus komisi la notarkreadon al profesiulo. (La notarkreado ne estas indikita. Mi povas proponi por la sekva simila disko helpon de miaj lernantoj en la lernokurso “Muzika informadiko”).

La literatura Esperanta teksto ne ĉiam koincidas laŭ silaba kvanto al la nota teksto (*Dormu Jesueto, Kristabia festo, Ho, bonvenon stelo, La kristnaska tempo*), iam ne koincidas silabaj kaj muzikaj akcentoj (*Ho, Etul’ Etuleto, Dormu Jesueto, La plej bela horo, Anĝeloj rekte el ĉielo*), povas esti paŭzo en la nota teksto meze de la vorto (*La betlehema lumo*) ktp.

La prononco de la kantistino estas sufiĉe klara kaj komprenebla, sed iam dezirindas ne moligi la vokalojn en la vortoj “alia” (“alija” en *Jesuo Etuleto*), “ĉia” (“ĉija” en *Jen stal’ mizera*) k.s.

Malgraŭ mankoj, neeviteblaj en tiaj diskoj, mi rekomendas al ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne sukcesis konatiĝi kun la disko, nepre fari tion kaj ricevi grandan plezuron de bona muziko en bona plenumo.

Irina Mironova

## Veterana Veterano

La unua libro originale verkita en Esperanto en Brazilo fariĝis 70-jara. Temas pri *Veterano* de Iŝmael Gomes Braga. La motivo de la verko estis demando por veteranaj samideanoj, disdonita en 1937 dum la Brazila Kongreso de Esperanto.

Kvankam Iŝmael Gomes Braga ne ŝatis esti konsiderata maljunulo, li konsentis respondi la demandojn. En la antaŭparolo li diras: “Veterano mi?!... Eksigita soldato aŭ emerita oficiro?!... Sed mi estas juna kaj brava batalanto!” Li nur petis, ke oni rigardu lin kiel “junulon de pli da tempo” ol la aliaj.



La verko estas valora historia dokumento, plena je gravaj faktoj kaj konsiloj por la venontaj generacioj. La teksto estis skribita en stilo simpla, flua kaj gajhumora. La libron kompletigas kolekto da artikoloj riĉaj je saĝeco kaj sobereco. Tiuj kvalitoj faras *Veteranon* leginda de ĉiu scivolema esperantisto.

La unua eldono (*Gazeto de Ameriko*, 1937) rapide elĉerpiĝis. Kelkaj favoraj recenzoj aperis en esperantistaj gazetoj. Ankoraŭ ekzistas ekzempleroj de la dua eldono (KKE, 1965). Mendebla rete ĉe: [www.kke.org.br](http://www.kke.org.br).

Fabiano Henrique

## Bulgara Esperantisto

La revuo *Bulgara Esperantisto* aperas kvarfoje jare. Ĝin eldonas Bulgara Esperanto-Asocio. Ĝi estas 20-paĝa. La jarabono estas 12 eŭroj.

En la revuo aperas artikoloj pri bulgara Esperanto-movado, poemoj kaj eseoj de konataj bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj, recenzoj pri novaj libroj, informoj pri diversaj Esperanto-aranĝoj en Bulgario kaj en aliaj landoj, kaj multaj aliaj artikoloj pri la problemoj de Esperanto kaj interlingvistiko.

La ĉefredaktoro de *Bulgara Esperantisto* estas la konata Esperanto-verkisto Julian Modest.

## Por pli bela Kristnasko!

Kun ĉi tiu kajero de *La Ondo* ĉiu abonanto donace ricevas disketon de Anna Osmakowicz.

Dezirantoj havi belan Esperanto-muzikon dum la Kristnasko povas aĉeti ŝiajn diskojn *Kristabia Festo* kaj *En Kristnaska Hor’* ĉe

✉ Pola Esperanto-Asocio, skr. poczt. 21, PL 44-101 Gliwice, Pollando

☒ [staman@esperanto.pl](mailto:staman@esperanto.pl), aŭ [staman@ka.onet.pl](mailto:staman@ka.onet.pl)

# La dika raporto de Couturat



Louis Couturat, la aŭtoro de Ido

En 1948 Gaston Waringhien (1901–1991) publikigis du-voluman verkon *Leteroj de L.-L. Zamenhof* kiu metis lumon en multajn postkulisajojn de la (ne nur) franca Esperanto-movado inter 1900 kaj 1914. La ĉefa evento (traŭmatiza por multaj, inkluzive de Zamenhof mem) estis la t. n. Ido-krizo de la jaroj 1907/08.

En 1900, okaze de la Universala Ekspozicio en Parizo, la franca logikisto kaj matematikisto Louis Couturat (1868–1914) fondis Delegacion por la Adopto de Internacia Help-Lingvo kiu trovis eĥon pli favoran ol la antaŭa agado de Amerika Filozofia Societo (1888). Inter la atutoj de la laboro de Couturat estis la ampleksa *Histoire de la langue universelle* (1903, <sup>2</sup>1907) kun ties suplemento el 1907 *Les nouvelles langues internationales* en kunlaboro kun la matematikisto Léopold Leau (1868–1943) per kiu li bilancis la klopodojn de la plan-lingva kreado.

Diversaj kunvenoj kaj societoj elektis kadre de la Ekspozicio delegitojn kiuj devus okupiĝi pri la demando de plan-lingvo. La 17an de januaro 1901 ili subskribis deklaron kun informo pri la celo kaj la proceduro. La alvoko ligita al ĉi deklaro havis grandan sukceson: ĝis oktobro 1907, 310 korporacioj, inter ili multaj kun pli ol 1000 membroj, deklaris konsenton pri enkonduko de plan-lingvo sen garantio, ke temo pri unu el la tiam ekzistantaj. Al la 12-kapa Komitato elektita de la Delegacio apartenis la jenaj personoj:

1. Manuel C. Barrios (1845–1920), prezidanto de la senato de Peruo;

2. Jan Baudouin de Courtenay (1843–1929), lingvisto en Peterburgo, vic-prezidanto;

3. Emile Boirac (1851–1917), rektoro de la universitato de Dijono, prezidanto de la esperantista Lingva Komitato;

4. Charles Bouchard (1837–1915), profesoro pri medicino en Parizo;

5. Loránd Eötvös (1848–1919), membro de la Hungara Akademio de Sciencoj;

6. Wilhelm Foerster (1852–1921), germana astronomo en Berlino, kiel honora prezidanto;

7. George Brinton McClellan Harvey (1864–1928), redaktoro de *North American Review*;

8. Otto Jespersen (1860–1943), lingvisto en Kopenhago, la posta aŭtoro de la plan-lingvo Novial (1928), vic-prezidanto;

9. Spiridion Lambros (1851–1919), historiisto kaj rektoro de la universitato de Ateno;

10. Constantin Le Paige (1852–1929), belga matematikisto;

11. Wilhelm Ostwald (1853–1932), germana kemiisto kaj Nobel-premiito (1909), prezidanto;

12. Hugo Schuchardt (1843–1927), romanisto en Graz.

En la decida kunveno de oktobro 1907 ĉi komitato propra-move alektis:

1. Gustav Rados (1862–1941), membro de la Hungara Akademio de Sciencoj, kiel anstataŭanto de Eötvös;

2. William Thomas Stead (1849–1912), ĵurnalista, editoro de *Review of Reviews*;

3. Giuseppe Peano (1858–1932), itala matematikisto, aŭtoro de la plan-lingva projekto Latino sine flexione (1903).

kaj la duopo Couturat kaj Léopold Leau.

Sendis anstataŭantojn: Bouchard per Paul Rodet (1854–?), Harvey per pastro Ernest Dimney (1866–1954), Stead per Paul Hugon kaj Boirac per la artileria generalo kaj posta pacifisto Gaston Moch (1859–1935).

La Komitato kunsidis en oktobro 1907 en Collège de Paris kaj decidis principe akcepti Esperanton, sed kun la modifoj elmontritaj en la Konkludoj<sup>1</sup> kaj entenataj en la anonima projekto de Ido. Pri tio ne konsentis la esperantista Lingva Komitato, okazis rompo. La



Louis de Beaufront, la pajlo-homo

nova projekto Ido, kies precipa aŭtoro estis Couturat mem, kvankam unue kiel pajlo-homo figuris Louis de Beaufront (1855–1935), komencis iri sian propran vojon. Por Esperanto, antaŭ la unua mond-milito, ĝi fariĝis konkuranto pli granda ol Esperanto mem sia-tempe por Volapük.

En sia komence menciita verko Waringhien aludas “dikan raporton” presitan de Couturat kiu servu al la Komitato “kiel gvidilo en ĝiaj laboroj”. Ne temas pri la Konkludoj, ĉar ili prezentigas kiel broŝuro nur 31-paĝa. Waringhien kiu eble vidis la “dikan raporton” ne donis precizigajn indikojn. Sed en la Konkludoj legeblas, ke tiu raporto estis esence konfidenca kaj rezervita al la membroj de la Komitato. El alia dokumento de la Delegacio<sup>2</sup> ni ekscias, ke la mistera Raporto estis produktita en nur 25 ekzempleroj kaj ne publikigita. Sendube ĝin ricevis la supre menciitaj 17 personoj kaj certe ankaŭ Zamenhof. Pri la ceteraj sep ekzempleroj regas neklareco.

Post vastaj esploroj mi sukcesis trovi du ekzemplerojn. Dank al ili povas publikiĝi la teksto de la dokumento okaze de la cent-jara jubileo de Ido, kies gloraj tagoj pasis jam delonge. La sorton de Ido sigelis en 1999 la *Bibliografio di Ido* verkita de Tazio Carlevaro kaj mi mem. Dezirindas la apero de detal-studoj pri Ido kaj ties ĉefaj protagonistoj.

**Reinhard Haupenthal**

## REFERENCOJ

1. COUTURAT, Louis; LEAU, Léopold. *Conclusions du rapport sur l'état de la langue internationale*. Coulommiers: Brodard 1907. 31 p.

2. COUTURAT, Louis; LEAU, Léopold. *Compte rendu des travaux du comité* (15–24 octobre 1907). Coulommiers: Brodard 1907. 32 p.

## Ekspozicio pri la esperanta novelo

Sukcesa inaŭguro de la dulingva ekspozicio pri "La esperanta novelo" en Budapeŝto, fare de la Konsulo de la Esperanta Civito kaj de la direktorino de la Fremdlingva Nacia Biblioteko, kadre de la Internacia Semajno de la Esperanto-Biblioteko.

La ekspozicio konsistas el dek du paneloj kaj ses vitrinoj, kiuj proponas literaturkritikan kaj biografian itineron pri la plej gravaj esperanto-novelistoj (inter kiuj tri virinoj). La vitrinoj enhavas rarajojn el la Kolektaĵo Fajsz, bonege prizorgata en tre konvena ejo, fare de s-ino Ilona Böde. Interalie eblas vidi la manuskripton de la novelaro de Marjorie Boulton *Okuloj*, kaj leterojn de ŝi al Julio Baghy.

La paneloj proponas (menciante ankaŭ aliajn aŭtorojn, ekzemple Cezaron Rossetti kaj Linan Gabrielli) la sekvajn kontribuojn al la esperanta novelarto: Julio Baghy, Raymond Schwartz, Ferenc Szilágyi, Reto Rossetti, Marjorie Boulton, Sándor Szathmári, Clelia Conterno Guglielminetti, Johán Valano, István Nemere, Spomenka Štimec kaj Giorgio Silfer. István Nemere (aŭtoro de jam 474 titoloj, absoluta rekordo en la hungara literaturo) estis la ŝatata gasto de literatura kafejo, tuj post la ekspozicia inaŭguro.

La sukceso de la aranĝo (kiu daŭros tutan semajnon) konvinkis la Bibliotekon inviti konstante la Esperantan Civiton por kune organizi ion okaze de la Internacia Semajno de la Esperanto-Biblioteko, la 42a en la jaro. En 2008 probable temos pri la esperanto-periodaĵoj.

HeKo

### Ricevitaj libroj

Bušma, Leonas. *Ombro de meditoj*: Aforismoj kaj miniaturaj / Tradukis el la litova Česlovas Liubomiras Tručionis, Telesforas Lukoševičius. — Panevėžys: Panevėžio spaustuvė, 2005. — 112 pĝ.; 300 ekz. — (Panevežis'a biblioteko de Esperanto, №15). — (Donaco de LitEA).

Drlík, Marcel. *Ĉeĥa kuracisto en koro de Afriko* / Tradukis el la ĉeĥa Olga Glendová k.a. — Praha: Aventinum, 2006. — 192 pĝ., il. — (Donaco Bernhard Eichkorn).

*Esperante kaj ekumene*: Fest-libro por la 75a naskiĝ-tago de Adolf Burkhardt / Editoris Irmī Hauptenthal, Reinhard Hauptenthal. — Schliengen: Edition Iltis, 2004. — 368 pĝ. — (Donaco de Bernhard Eichkorn).

Karalius, Vytautas. *Sizifo sen ŝtono*: Pensoj kaj aludoj / Tradukis el la litova Palmira Lukoševičiene, Telesforas Lukoševičius. — Panevėžys: Panevėžio spaustuvė, 2005. — 80 pĝ.; 300 ekz. — (Panevežis'a biblioteko de Esperanto, №16). — (Donaco de LitEA).

Karpunina, Lena. *Neokazinta amo*: [Originala novelaro] / Antaŭparolo de Sten Johansson. — Antverpeno: FEL, 2007. — 149 pĝ. — (Serio *Stafeto*; №31). — (Recenzoekzemplero).

Klag, Walter. *Peter Altenberg. Vivo kaj verkoj*: Dua kaj lasta kajero. — Vieno: Klag, 2007. — 16 pĝ., il. — (Donaco de Walter Klag).

Klag, Walter. *Sat. iroj el Aŭstrio*: Dua kajero. — Vieno: Klag, 2007. — 16 pĝ., il. — (Donaco de Walter Klag).

Simenon, Georges. *La flava hundo*: Krimromano / Tradukis el la franca Daniel Luez; Antaŭparolo de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 120 pĝ.; 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №14). — (Donaco de Sezonoj).

Sipovič, Valerij. *Sekreto de la patrino*: Novelo. — M.: Impeto, 2006. — 112 pĝ.; 300 ekz. — [Aĉeto].

### Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako. 2007/1; EAB Update. 2007/39; Esperanto aktuell. 2007/4; Esperanto en Azio. 2007/57; Esperanto. 2007/9,10; Femina. 2007/11; Ĝenerala Informilo. 2007/145; Heroldo de Esperanto. 2007/10,11,12; Informa Bulteno. 2007/3; Jen. 2007/171; Juna Amiko. 2007/2; Kataluna Esperantisto. 2007/343; Kontakto. 2007/4; La Brita Esperantisto. 2007/963; La Ondo de Esperanto. 2007/10; Literatura Foiro. 2007/228; Litova Stelo. 2007/3; Monato. 2007/10; Norvega Esperantisto. 2007/4; REGo. 2007/5; Scienco kaj Kulturo. 2007/4; Sennacieca Revuo. 2007/134-135; Sennaciulo. 2007/7-8; Spiritisma Esperanto-Informilo. 2007/136; TEJO Tutmonde. 2007/4; Tempo. 2007/2; Vekilo. 2007/2; Verda Saksfono. 2007/18.

## Gazetoj

*Literatura Foiro*. 2007. №228

**Originala literaturo**: la forpasinta poeto Julius Balbin ricevas omaĝon per sia poemo pri Janis Lipke kaj per biografia artikolo de Zofia Banet Fornalowa. Márton Fejes malkovras nek-natajn paŝojn el la vivo de Julio Baghy: la siberian mozaikon konsistigas historiaj fotoj kaj faksimiloj.

**Mondliteraturo**: Carlo Goldoni dum la jubilea jaro per la lasta akto de *La ruza vidvino* en traduko de Perla Martinelli, kaj itinero tra la spuroj de Goldoni en Parizo per elzeviro de Giorgio Silfer.

**Nia Lingvo**: Ilona Koutny konkludas la debaton pri la altrudo de etnolingvaj signifoj al esperantaj vortoj (ekinta en LF 220 per la artikoloj de Dimitar Haĝiev kaj Laszlo Radacsy).

**Interlingvistiko**: okaze de la centjariĝo de la Ido-skismo, kvara parto de la studo de Claude Gacond pri la vivo kaj didaktika kontribuo de Louis de Beaufront.

**Recenza eseo**: la parolan kulturon en nia lingvo, de Zamenhof ĝis Lapenna kaj poste, pritraktas Carlo Minnaja okaze de la apero de kompaktdiskoj kun paroladoj de Ivo Lapenna.

**Afriko**: Marie-France Conde Rey pri la unua PEN-kongreso en la nigra kontinento, Perla Martinelli pri la literatura seminario de LF-koop en Dakaro.

En la rubriko pri la **Sepa Arto**: *Iñárritu pri "Babel"*: kino estas esperanto de Giorgio Silfer.

La revuo estas ĉefredaktata de sen. Ljubomir Trifončovski kaj oficas kiel organo de la Esperanta PEN-Centro. La revuon posedas, eldonas kaj administras LF-koop. Provekzemplero estas mendebla ĉe: CP 928, CH-2301 Ĉaŭdefono (Svislando), rete [lf-koop@esperantio.net](mailto:lf-koop@esperantio.net).

HeKo

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENSEPENA

**La mondo iĝas por vi malpli kosta!**

Nun vi povas malfermi vian mondon kaj ricevi la magazinon MONATO dum 3 monatoj senpage.

Por pliaj informoj kaj kondiĉoj vizitu: [www.monato.net](http://www.monato.net)

aŭ skribu al MONATO  
FLANDRA ESPERANTO-LIGO  
FRANKRIJKLEI 140  
B-2000 ANTWERPEN, BELGIO  
FAKSE: +32 3 233 54 33  
RETE: MONATO@FEL.ESPERANTO.BE

Por la *Sesangula krucvortenigmo* venis nur sep respondoj; ĉiuj estas ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans (Britio), Erkki Kempainen, Bruno Lehtinen (Finnlando), Dorota Burchardt, Hanna Skalska (Pollando), Klara Ilutoviĉ, Svetlana Konjašova (Ruslando).

La loto donis libropremion al **Bruno Lehtinen**. Gratulon!  
La ĝusta respondo: 2 literoj **Z**.

## Du liter-taskoj

1. El du vortoj forstreku SES LITEROJN por ricevi nomon kaj familinomon de fama esperantisto:

**SIVEOS LALIPETERNONJAN**

2. El unu vorto ricevu du geografiajn nomojn:

**SKANDINATOLIPARO**

La solvoj venu al la redakcio rete aŭ poŝte antaŭ 15 dec.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**



### Malĝentile

— Mia edzo estas nun kvardekjara. Precize dek jaroj estas la diferenco inter niaj aĝoj.

— Ĉu vere? Mi tute ne supozis, ke vi, sinjorino, havas jam kvindek jarojn!

### Sportaj trofeoj

*Knabo*: Mi havas multajn belajn memoraĵojn el la lasta vintra sport-sezono.

*Knabino*: Kiajn?

*Knabo*: Tri pokalojn kaj du medalojn.

*Knabino*: Tre bele! Ankaŭ mi havas kelkajn memorobjektojn el la vintra sport-sezono.

*Knabo*: Kiajn?

*Knabino*: Kvin fianĉinajn ringojn.

### Edziĝa vivo

— Nu, Karlo, ĉu vi jam solvis tiun malpacon kun via edzino?

— Ne estis necese. Ni komencis jam malpaci pro alia afero.

### Kontraŭvole

— Ĉu vi nur tiel simple deklaris al Karlo, ke vi amas lin?

— Ne, tute ne! Li perforte elprenis ĝin el mi.

### Geedzoj

— Tiel mi vidas, Oskaro, ke vi pli rapide maljuniĝas, ol mi.

— Tio estas ebla. Ĉar mi devas pagi fakturojn.

### Certa rimedo

— Nu, ĉu vi vere edziniĝis al via obstina adoranto?

— Jes. Ĝis nun li pendis ĉiam sur mi, sed de nun almenaŭ en la vesperoj mi estos libera.

### La ĝusta ilo

*Edzino (al la edzo)*: Sed Johano, kiel vi povas klopodi, enbati najlon en la muron per vest-broso? Tamen, uzu vian kapon!

El *La Praktiko* (jaro 1937)  
plukis **Halina Gorecka**

## SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ

### el la kolekto de reduktoro

#### Ujismo baldaŭ kristalklara

Pli kaj pli konturiĝas le [tiele! — I.E.] pensaro de GBEGLO Koffi pri Esperantujismo. (*Ondo da Vero*, 2007, №55, <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-en-togoland/message/400>)

#### Poezion plej persone

Triesta Esperanto starigas internacian konkurson... Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2007. La vizitontoj donos poetojn al la plej bela verko... (Edvige Tantin Ackermann, komuniko de 25 mar 2007; rimarkis Claude Nourmont)

#### Nun ne

La 17an de julio 1996 la asembleo de la asocio "Heroldo de Esperanto" aprobis unuanime proponon de sia prezidanto, s-ro Gian Carlo Fighiera. La asocio konsistis el nur kvin personoj: ges-roj Fighiera, Chiarovano kaj Concina (preskaŭ ĉiuj nun ne vivas). ("Heroldo de Esperanto", "Detaloj pri la transdono de HdE"; 2006, sen plia dato kaj sen aŭtoro, <http://www.esperantio.net/index.php?id=34>)

#### Pri mono oni fajfas

[*La Mastro de l' Ringoj*] ... estis eldonita danke al seninteresa prunto de FAME... (Aleksander Korĵenkov, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/10595>, 14 sep 2007)

#### Elcivitanigo

La vicprezidantino, sen. Perla Martinelli, transprenas la oficon de prezidanto el c-ano Daniel Muhlemann, kiu fariĝas sekretario. (HeKo 332 8-B, 24 jun 2007)

#### Eĉ resti hejme detruas

Ili ne venis por kaŭzi damaĝojn, nek por enmiksiĝi en terorismajn agojn. (*Solidara mesaĝo de politika malliberulo usona pri La Kvinopo*, 18 sep., <http://www.cubanoticoj.ain.cu/2007/0918solidaridadcinco.htm>)

#### Sistemo, sed frenezo en ĝi

La estonta, definitiva Eŭropa Konstitucio devus havi apartan alienon pri malpermeso de "preventiva" aŭ "ataka" milito. (Ludoviko Molnár kaj Julinjo Farkas, <http://groups.yahoo.com/group/parlamentagaado/message/666>, 29 jan 2006)

Plukis **István Ertl**

## Kiu estas sur la foto?

Dum la jaro 2004 ni aperigis konkurson "Kiu estas sur la foto?" kun junaĝaj fotoj de nuntempaj aktivuloj. Ĉi-foje estas foto de nuntempa aktivulo, fotita ĉi-somere en nekutima situacio. Lia nomo de tempo al tempo aperas en *La Ondo*, ankaŭ en ĉi tiu kajero.

Bonvolu skribi antaŭ 15 dec la nomon de la fotito. Inter la solvintoj ni lotumos libropremion.



## Perantoj de "La Ondo de Esperanto"

**Argentino:** Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

**Aŭstrio:** Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia, DF 70084-970

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mahalkov, "Nadejda" V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** Jozefo Baksa, Pf. 115, HU-8901 Zalaegerszeg KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

**Pollando:** vakas (pagu al la konto de H. Gorecka en Olsztyn)

**Portugaliao:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Esperanto-urbo.** En la oktobra kajero de *La Ondo* vi legis, ke en la Esperanto-urbo Herzberg en *Pizzeria Mamma Mia* estis kreita kvinpinta *Esperanto-pico*. Nun vidu ĝin! Sur la Esperanto-pico troviĝas tomatoj kaj fromaĝo kaj tavolo kun amareta eruko. Tio garantias verdkoloran aspekton. (Zsófia Kóródi)



**Finnlando.** Direktoro de la Internacia Esperanto-Instituto, Atilio Orellana Rojas, vizitis ĉi-somere la urbon Turku/Åbo. En la Urba Biblioteko li havis la belan surprizon trovi *La Ondon de Esperanto* inter diverslandaj kaj diverslingvaj revuoj, kiujn ĉiu vizitanto de la biblioteko povas foliumi kaj prunti por legado.




J. R. R. Tolkien

## LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO

Tolkien J.R.R. *La Kunularo de l' Ringo*.  
La unua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.  
464 paĝoj, 30 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

## LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ

Tolkien J.R.R. *La du turegoj*.  
La dua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.  
368 paĝoj, 27 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

## LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REĜO

Tolkien J.R.R. *La reveno de la Reĝo*.  
La tria volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.  
328 paĝoj, 24 eŭroj.



Georges Simenon. *La flava hundo*.  
La kvara Esperanto-libro pri komisaro Maigret.  
120 paĝoj, 12 eŭroj.